



**NORDHUNGARIA INFORMO**

*Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo  
Miskolc*

Julio-Aŭgusto 2009a

<b>SOMERO</b> .....	3
<b>La Suno, Luno kaj Steloj</b> .....	4
<b>La rozpetalo</b> .....	7
<b>ŜI</b> .....	10
<b>La „Sankta Triunuo” Hungara Ortodoksa Preĝejo de Miskolc</b> .....	11
Hungara Ortodoksa Eklezia Muzeo de Miskolc .....	11
<b>Kuirarto koncerne anseron</b> .....	17
<b>ŜERCOJ</b> .....	18
La fiŝkaptisto .....	19
La kamparano kaj la azeno .....	19
Letero el Nijhnij Tagil, Rusio .....	19
<b>HIMNO DE TAGILAJ ESPERANTISTOJ</b> .....	20
<b>KANTO DE TAGILAJ KOMENCANTOJ</b> .....	20
<b>KANTO DE TAGILAJ KOMENCANTOJ</b> .....	21
<b>LA AVAŜ - MONTA PREĜEJO</b> .....	21
<b>MEBLARO DE LA PREĜEJO</b> .....	21
<b>AL LA SOCIO DONITA HELPO</b> .....	25
<b>ALKONSTRUAĴOJ</b> .....	25
<b>PROBLEMOJ DE LA PREĜEJ-APUDE KONSTRUITAJ KAPELOJ</b> .....	26
<b>*En Bjalistoko 25.07-01.08.2009*</b> .....	27
<b>KONGRESA REZULUCIO</b> .....	30

## SOMERO

„Somero!

*Kantas kukolo.*

*Post unu aŭ pli da jaroj*

*Iĝos mi via edzino.”*

Ni kantas cite la tekston de la malnova, bela hungara popolkanto, ĉar en nia malvasta patrio la plej multaj geedziĝoj okazas somere. En aŭgusto ĉiujare oni prezentas la „Matyó” geedziĝ-ceremonion<sup>2</sup> – ĉi-ĉarman, belan popolkutimon – de la niaregiona teritorio „Matyó-föld” en urbo Mezökövesd. En la pli fruaj jaroj ni raportis pri la nacifestaj (je la 20a de aŭgustaj) okazaĵoj tiurbe, tial ne la faman geedziĝon, sed aliajn somerajn fajnajn delikataĵojn ni prezentos en la nuna numero de nia revuo. Antaŭ ĉio: al viaj bonaj programoj ni deziras bonan veteron kaj ankaŭ agrablajn partnerojn.

Kiel somerajn legindaĵojn ni proponas el la multaj ĝuindaj artikoloj de nia revuo, la du amhistoriojn, krom historioj de la miŝkolcaj Ortodoksa Preĝejo kaj de la Ortodoksa Eklezia Muzeo. Legendaj estos ankaŭ la humoraĵoj.

Sed, ĉar delonge konatas jam, kie regas lumo, tie ĉeestas ankaŭ ombro, ni alvokas vian atenton al la damaĝoj atingeblaj vin dum ĝuado de la somero. Tiuj meritas vian atenton, por preterlasi ilin!

*Ni konsilas:*

1. Se via korpo estas tro varmiĝinta ne saltu en pli malvarmgradan akvon – rivero, lago, maro, ktp.
2. Ne pasigu tro longan tempon sub la brulega suno en varm-akva banejo.
3. Ne lasu brulvundiĝi vian korphaŭton, sen aplikado de oleoj kremoj uzendaj kontraŭbruliĝo kaj sen iro al la pli malvarmetaj ombraj lokoj.
4. Ankaŭ la nov-partner-kontakto povas kaŝi danĝerojn. Uzu kontraŭkoncipaĵon, kondomon eviti la nedeziritaĵojn.
5. Bonvolu lavi vin pura ĉiam konvene. Post la strandbano hejme lavu vin tre bone kaj ankaŭ viajn kapharojn lavu, por eviti la eblajn haŭtinflamaĵojn. Tiu povas esti ekzemple la ekzemo, kiu povas atingi vin tiuloke facile, sed liberiĝi de ĝi estas jam malrapida procezo. Se vi spertos tamen, ke via haŭto ekjukas forte kaj komencas aperi – sur hiperemia bazo sidantaj pinglokapaj, poste humidantaj – veziketoj, sur iu ajn partoj de via korpo, ne gratu, ĉar ĝuste pere de tiu ago per viaj ungoj vi plimultigos la infekton, sed tuj turnu vin al fakkuracisto! Ĉi tiu ekzemo estas haŭtmalsano: haŭt-aliformiĝo, kiun oni registras kiel alergian malsanon. Sed oni devas scii pri tio, kvankam la sero de la ekzemo malsekiĝos al krusto, eĉ tiam jukos ĉi ruĝaj makuloj de la korpo. Ĝin povas kaŭzi kemikaĵ- fizikaj malutiloj kaj mikroboj. La plej oftaj estas la kemiaj damaĝoj=efikantaj de la ĉirkaŭaĵoj. Oni scias, ke plej ofte ili troviĝas sur la manoj kaj piedoj, sed se ĝi jam disŝutiĝas, la ekzemo aperas sur la tuta haŭto de la korpo. Ni esperas – kvankam vi povis aŭdi, legi jam milfoje pri ĉi tiuj danĝeroj, vi bone memoros pri ili kaj vi estos singardaj.

***Agrablan somerumadon, bonan distriĝon ni deziras al vi ĉiuj!***

Adri Pásztor, nome de la EAR „Király Lajos”



### **Adri Pásztor**

## **La Suno, Luno kaj Steloj**

Elinjo estis kvindekjarulino, kiam ŝia edzo mortis post ilia dudek kvin jara geedzeco. Infanon ili ne havis. Pro manko de la kutima kaj amata partnero, ŝi ne trovis sian trankvilon. Vane ĉirkaŭis ŝin la milpompa somero, la ĉiutagoj ŝajnis dezertaj, malplenaj, senkoloraj.

Foje en la vaporbanejo ŝi konatiĝis kun iu virino, kiu parolis al ŝi pri „la rondo familia” de la geesperantistoj, invitis ŝin tien, al ili. Ja, ankaŭ ŝi ne havas familion, tamen ne solas apartanente al la parolantoj de la lingvo Esperanto. Nu, Elizabeta pripensis provi, kaj skribigis sin unue en naturamikan grupon, poste en iun lingvolernejon por lernakiri tiun fremdan lingvon. Ŝi akiris multajn konatecojn, novajn geamikojn ambaŭloke. Ŝia vivo pleniĝis per nova senco. Baldaŭ ŝi konatiĝis kun esperantisto, kun kiu ili bone komprenis unu la alian kaj post ne longa tempo ili geedziĝis. De tiam ili jam kune ekskursis, iris en societojn, teatron, muzeon, eĉ danci. Karlo, la nova edzo kiu estis inĝeniero, multe helpis fari la hejmajn laborojn kaj dum sia libertempo ŝatokupante ankaŭ pentradis bildojn de naturo. Elinjo post fino de la kuirejaj laboroj - libertempante brodis kaj lignoskulptis. Ili estis vera artista paro. Ili ofte vizitis ankaŭ diversajn kunvenojn de artistoj, verkistoj.

Unujara estis jam ilia geedziĝo, kiam en iu socia kunveno aperis fremdulo, kiun ili ne vidis ĝis tiam. Iu informis ilin, ke la nur por ili nekonatulo estas konata ĵurnalisto, verkisto, poeto, arttradukisto, kaj mem ilustras siajn verkojn per propraj desegnaĵoj.

Gabrielo, la fremdulo iĝis simpatia al Karlo, do invitis lin en sian familian hejmon gastigi. Poste ĉi inviton sekvis pliaj. Gabrielo ĉiam volonte venis. Al sinjorino Elizabeta rimarkiĝis, ke la gasto vizitante ilin neniam kunportis florojn, deserton aŭ unu botelon da trinkaĵo kiel tio kutimas ĉe vizitoj. Ĉiam li klinas sin iom al ŝi, kaj manprenante salutas ilin. La salutmaniero ne ŝanĝiĝis post ilia rekta interamikiĝo, lia sintenado estis ceremonia. Al Gabrielo plaĉis brodaĵoj kaj la groteskvizaĝaj lignoskulptitaj bestetoj de Elinjo, kiuj fine estis foresenditaj, por ĝojigi infanojn, en iun proksiman infanhejmon. Ilia novamiko diris, ke la lignobestetoj similas al homoj kaj estas tre ridigaj. Elinjo ĝojis pri la rekono kaj malrapide ankaŭ ŝi povis kore akcepti la al ŝi pli frue tute ne simpatian novan amikon de sia edzo. Poste surprizis ŝin, kiel forte ŝi atendas la alvenon de sia amiko, atendegis la fortan varman manprenon kiu estis, kiel la ŝia. Fidon komencis senti ŝi al li. Foje ŝi admiris lian griziĝadan harbuklon, foj-foje ektuŝantan lian altan frunton. Kiam ŝi rigardis sur lian vizaĝon, kaj kaptis la rigardon ripozantan sur ŝia vizaĝo de liaj brilaj okuloj, pensis: kvazaŭ la Suno, Luno kaj Steloj ripozus saltante surteren sur ĉi vizaĝo.

Sed Gabrielo tamen venis neniam malplenmane. Li portis montri siajn desegnaĵojn, freŝe verkitajn poemojn, manuskriptojn de siaj libroj. Li atendegis kaj ĉiam ĝoje akceptis iliajn opiniojn. Aparte gravis por li la opinio de Elizabeta. Kelkfoje okazis, ke la manuskripton de iu

nova romano de Gabrielo ili legis kune, sidante unu apud la alia, kaj dume foj-foje alridis unu la alian pro iu interesa parto de la legata historio. Tiaokaze ili ambaŭ ruĝetiĝis. Poste ankaŭ Elinjo kunkolektis siajn malnovajn rememorojn kaj verkis sian unuan novelaron. Ĝian eldonon kunhelpis Gabrielo. Same li prezentis la novan verkon al la legataro dum aŭtora renkontiĝo. Rekompence pro la helpo, li ricevis kiseton de Elinjo. Tuj ili sentis varmegon en la ĉambrego - eble tial ili ruĝiĝis ambaŭ.

Varme brilis la okuloj de Gabrielo, sed post iu telefonvoko ricevita neatendite, li tamen ne akceptis ilian inviton por festena vespermanĝo. Li klarigis, ke li estas okupita kaj devas urĝe hejmenveturi. Ilia sekva renkontiĝo jam ne estis tiel sennube intima, kia pli frue. Ia streĉeco oscilis inter ili. Kaj poste Gabrielo jam ne tre serĉis la ŝancon renkonti Elinjon kaj Karlon. Elinjo komencis rimarki la mankon de Gabrielo. Al la retadreso ricevita de li ŝi vane sendis mesaĝojn, respondo ne venis. Kiam ili renkontis sin, Elinjo riproĉis al li: kial li ne respondas al ŝiaj leteroj, kial li primemoris nur la nomtago de Karlo, sed ŝian ne, krome: kial li rakontas neniam pri siaj familianoj, ja ili ŝatus scii pri ili.

Tiam Gabrielo ekstaris, senvorte foriris. Elinjo ektiminte postrigardis lin.

Kion mi faris? Kion mi faris? – demandis ŝi al si, kaj ekploris. Ŝi tre ekamis Gabrielon. Centfoje ŝi atentis dum siaj interparoladoj, petolaj babiladoj, ke ŝi ne ofendu lin per io, aŭ ne transpaŝu la limon de seriozeco. Ĉar ŝi pensis: se Gabrielo estas edziĝinta, havanta familion (certe li estas tia), ŝi povos havi kaj daŭrigi sian amikecon, se ŝi dece kondutas.

Poste Gabrielo revenis portante unu blankan rozon, mankisis kaj gratulis Elizabetan okaze de ŝia nomtago. Li esperis ricevi rideton, repaciĝon de ŝi. Tion li sukcesis atingi. Sed post ĉi okazo jam nenio estis tia, kia pli frue. Gabrielo ĉiam pli longtempe estis for de la kunvenoj de artistoj verkistoj. Tiam li jam treege mankis al Elizabeta. De tempo al tempo la mankosento jam suferigis ŝin. Tiafoje ŝi elprenis la bildkartojn de Gabrielo senditajn de foraj landoj, kaj rigardadis ties bildojn kaj aliflanke la mallongajn saluttekstojn. Eĉ tiuj kelkaj vortoj bonvenis al ŝi. Poste ŝi konsciiĝis, kion ŝia amiko jam delonge sciis, - ke ŝi enamiĝis en Gabrielon. Ŝi jam estus ankaŭ per tio kontenta, se ŝi enspireblus la saman aeron kun li ie, nur gravus scii ke li estas ie en ŝia proksimeco. Sed se ili renkontiĝis, plimultiĝis inter ili la etaj misopinioj, kvereletoj pro bagatelaĵoj. Kion ajn verkis Elinjo, Gabrielo ne kontentis, taksis ĝin malaltnivela, ĉiam en ĉiu afero li pravis ks. Ĉi subtakso komencis ĉiam pli multe ĝeni Elinjon. La supozata desupra rideto pli kaj pli multe afliktis ŝian virinan vantecon kaj sincere varman koron. Se Gabrielo alparolis ŝin, ŝi ekstremis, apenaŭ povis respondi.

Poste Gabrielo komencis diradi, ke li deziris ne tian amikecon kun Elizabeta. Kaj, ĉar Elizabeta aliĝis, li retiras sian amikecon de ŝi. Ĉi eldiro jam tro multas por la amanta koro de Elinjo. Dume ŝi havis ankaŭ konscienciproĉojn pro tio, ke ŝia edzo vane ĉirkaŭprenis ŝin per tiom multe da amo, ŝi pensis tage-nokte pri Gabrielo, sopirante lin. Ŝi konvinkiĝis: kion ŝi sentas, tio estas amo, amoro kaj tiom profunda, kian ŝi sentis neniam en sia vivo. Kunfandiĝis en ĝi la estimo al la elstara verkisto, amo al la amiko, la amoro kaj la dankemo pro lia multa senegoisma helpo.

Ankaŭ ŝi rimarkis la aliĝon de Gabrielo, sed ne konis ties kaŭzon. Sed ŝi sciis tion, ke la amikeco ne estas paperfolio, kiun oni povas proponi por akcepto al iu, kaj poste repreni. La amikeco baziĝas sur ambaŭflankaj internaj kaj eksteraj homaj valoroj, reciproka simpatio, interkompreno, sed ne povas baziĝi sur orgojla desupriĝo aŭ momenta kaprico. Ŝi sentis, ke pro ilia malproksimiĝo unu de la alia, Gabrielo perdos ŝian sincere varman koron kaj per ĝi la ŝancon, ke ili povu doni multan puran vivĝojon unu al alia. Ŝi ne sciis: kial Gabrielo ne parolis pri sia familio malgraŭ tio, ke iam li montris ilian foton. Sur tiu foto videblis liaj edzino kaj tri filetoj. Ŝi pensis, ke feliĉa homo parolas, malfeliĉa ne. Certe ia tre granda malfeliĉo premas lian familion, pri kiu paroli estus tro suferige. Eble tial estas tiome moroza kaj malaproba ilia amiko, se ŝi demandis lin pri ili.

Elizabeta serĉis siajn figurojn en la romanoj de Gabrielo. Ne trovante ŝi pensis: ili estas certe tro simplaj homoj, kiuj ne meritas priskribon. Poste, kiam ŝi telefone volis saluti Gabrielon en lia nomtago, okazis la kontakto-rompo. Gabrielo, la laŭŝajne fortanima homo preskaŭ plore postulis de ŝi, ke ekde tiu tago ili interrompu sian interrilaton. Elinjo kaj Karlo serĉu lin neniam plu, kaj nek li serĉos la eblecon renkontiĝi kun ili. La kialumo denove forrestis, kaj restis nedemandebla. Elinjo tuj promesis la plenumon de lia deziro por trankviligi lin, sed ŝia koro preskaŭ krevis pro la malĝojo. Ŝi plie sentis ol sciis, ke Gabrielo pro io certe bone decidis, sed ĉi decido tamen ŝokis ŝin kaj Karlon.

Post ĉi evento ili vere ne renkontiĝis kun Gabrielo dum la art-kunsidoj. La jaroj pasis unu post la alia.

Ili atingis jam siajn sepdekajn jarojn, kiam vojaĝante en Budapeŝto, sur la rulŝtuparo de la ĉefurba metroo Elinjo rimarkis viron, sur kies mano prenanta la apogrelon du oraj fingringoj brilas unu apud la alia. Sed, kiaj oraj ringoj!

La viro vojaĝis el la mala direkto kontraŭ ili. Subbrake li tenis grandan pakaĵon, alimane li tenis ŝajne pezan aktujon. Sur lian altan frunton falis arĝentgriza harbuklo, li indiferece rigardis antaŭ sin. Kiam li alproksimiĝis, Elinjo ekkonis unun el la du viraj fingringoj. En iu kermesa foiro ŝi aĉetis la orfiligranan ringon kun du interplektitaj rozbrancetoj kun blankaj rozoj. Tiam ŝi aĉetis du fingringojn, ĉar la vendisto diris, ke en la mondo estas nur du tiaj. Ilin pretigis artisto por iuj geamantoj. Sed kiam la ringoj pretiĝis, la amo forpasis. Unu ricevis Gabrielo, la alian Karlo. Gabrielo promesis porti ĝin ĝismorte. Ankaŭ Karlo portas ĝin surfingre ĝis nun.

Kun la nomo de Gabrielo, ĝojplena krieto forlasis la lipojn de Elinjo. Pro la voĉo la viro levis kapon kaj explore rigardis ŝin. Ĝoja rideto inundis lian rondan vizaĝon kaj li ruĝetiĝis ĝis siaj arĝentaj harradikoj. Li ekkonis siajn geamikojn, sed li havis tempon jam nur por unu demando:

Ĉu via adreso estas la malnova?- kaj post ilia jesa respondo ili jam malaperis el la vido de unu de la alia.

Post kelkaj tagoj libropaketo alvenis. En ĝi estis la du lastaj libroj de Gabrielo. Unu estis dediĉita al Karlo, la alian li dediĉis al Elinjo jam en ties antaŭparolo. La titolo de ĉi libro estis: La Suno, Luno kaj Steloj.

Ĝi estis romano, kian li ĝis tiam neniam verkis. Biografia romano, en kiu li priskribis sian propran vivon. Ĉion tiel, kiel tio fluis antaŭ kaj post la renkonto de Elinjo kaj Karlo:

Li ekvidis la mondon, kiel unuanaskito. Lia patrino mortis pro puerpera febro. Por anstataŭigi ŝin, la patro ankoraŭ dufoje edziĝis, (ĉar ankaŭ la dua edzino baldaŭ mortis), tiel tamen feliĉe li sukcesis pleneduki la filon. Gabrielo edziĝis frue. Li prenis al si germanevenan dezirindan blondan belulinon. Ili havis tri belajn filojn. Ĉiuj tri finis universitaton, sekvante la patran modelon, por la ĝojo de la gepatroj.

Poste Gabrielo sendis ilin unu post alia por studvojaĝi eksterlanden, preskaŭ samtempe. La ĝojo de la gepatroj ne longdaŭris. La filoj unu post la alia suferis akcidenton dum siaj eksterlandaj vojaĝoj. Ĉiuj tri ripozas en fremda tero. Lia edzino lin kulpigis pro la morto de la filoj – dirante, ke ilia patro mem sendis ilin en morton. Li suferis nervokolapson, longe restadis en nervo-sanatorio. Reveninte hejmen, bonodora letereto atendis lin. La edzino skribis, ke ŝi reiris en Germanion, ĉar ŝi jam ne povas kunvivi kun sia edzo. Gabrielo vane sendis revokan leteron al ŝi, respondo ne venis, li ne povis atingi ŝin. Lia edzino forlasis lin, sed lasis ĉe li ŝian nemovkapablan patrinon, kiun li, la bofilo devis flegi, nutri, prizorgi. Li povis nek disedziĝi pro nescio, kie estas la edzino. Krome, la bopatrinon li ne povis flegigi de alia edzino. Tiutempe li renkontis Karlon kaj Elizabetan.

Kiam evidentiĝis al li la amo de Elizabeta, li tute konfuziĝis. Unue li fieris pro la amo de tiu purakorulino. Sed pripensinda estis ankaŭ la situacio de lia amiko Karlo. Li ne havis rajton detrui la belan geedzan interrilaton de siaj geamikoj, kvankam li estis ĝisorele enamiĝinta en

Elinjon. Inter liaj baraktadoj, neatendite realvenis lia edzino. Ŝi diris, ke ŝi malsanas kaj volas vivi hejme ĝismorte. Ŝi petis la edzon reakcepti ŝin en sian favoron.

Jen tiam li interrompis la kontakton kun la geedzoj, ĉar li, perlo de verkistoj ne povis trovi alian solvon por la ordigo de sia vivo. La edzino: la belega Hilde estis operaciita pro suspekto de mamkancero. La operacio sukcesis, kaj ŝi povis entombigi sian paralizitan patrinon post dek kvin jaroj. Post novaj kvin jaroj, ankaŭ ŝi mortis. Post la morto de liaj bopatrino kaj edzino, translokiĝis al li la tria edzino de lia patro, por ke neniu el inter ili vivu sola. La jam multjara virino instigis lin verki la historion de sia peripetita vivo.

Gabrielo dediĉis ĉi sian verkon al sia plejamato: al Elizabeta:

- Mi dediĉas ĉi mian verkon al vi, Elinjo – skribis li en la antaŭparolo -, kiu estis por mi la Suno, Luno kaj Steloj, brillumigantaj mian ĉielon konsolante min ĉiutempe.

Jam mallumo regis en la ĉambro, kiam Elinjo finis la legadon. Malrapide ŝi fermis la libron, rekliniĝis en la fotelo. Ŝi pensis pri Gabrielo.

Kiam Karlo envenis kaj lumigis la ĉambron, ŝi donis la libron en liajn manojn, por ke ankaŭ li ekkonu ĝin. Post ĝia lego ili jam sciis, kion ili ĝis tiam nur sentis, ke Gabrielo estis ilia unika vera amiko, kiun ili neniam forgesos.

### **Adri Pásztor** **La rozpetalo**

La geedzoj, pace, ĝoje vivis, ame helpante unu la alian. Ili havis la samajn ŝatokupojn: kreskigis florojn en sia ĝardeneto por la hejmateblaj florzonoj kaj sur la tombojn de siaj estintaj geamatoj. Ekskursante ili ĝuis la belajn pejzaĝojn, sed jam ne grimpis al la montosuproj, por rigardi de tie malsupren al la lirlanta rivereto, zonita per urtikarejo. Sur la lagbordapuda kampo ili ankoraŭ kolektis sovaĝajn florojn, sed jam ne ŝiris la pli fortatigajn florojn por ornamado de sia loĝejo. Ili faris mallongajn promenojn, kaj ŝatis sidadi sur la benkoj de floraj parkoj. Tiam ili ridete rigardis la etulojn, kiel ili pilkludas, lernas bicikli. Foje, la edzino Elizabeta petis sian Karlon, ke ili vizitu la bestaron en la montosupra bestĝardeno. Apud la tien kondukanta vojo iam funkciis spirorgana rehabilita sanatorio, kies flegito ankaŭ ŝi estis, kiam oni provis mildigi ŝiajn astmajn suferojn. La promenado estis agrabla tien-reen tra la varmeta pinarbaro.

Hejmenveninte, surprizite ili vidis, ke ili havas poŝtaĵon. Jam delonge ili ne ricevis leteron. Sinjorino Elizabeta surmetis la okulvitrojn por vidi, de kie venis la koverta.

Sur ĝi ne estis notita la nomo de la sendinto. Sed, laŭ la adresmaniero ŝi tuj sciis, kiu sendis la leteron. Ŝia koro forte ekbatis kaj pli rapide batadis plu.

La malfermitan koverton ŝi transdonis al sia edzo Karlo. Li legu unue: kial, kaj kion skribis ties sendinto. Jam vesperiĝa mallumo regis en la ĉambro. Ili devis fari lumon.

Karlo, ne leginte la leteron, redonis ĝin al Elizabeta. Legu ĝin ŝi, poste rakontu pri la enhavo. Li jam ne rememoris pri la sendinto.

- Kiu skribis, kiu li estas, kial li skribis? – demandis li per laca scivolo.

- Nia amiko: Gabrielo, la ĵurnalisto! – diris edzino Elizabeta. Li ŝatus revidi nin, venus viziti nin, se ankaŭ ni ŝatus renkontiĝi kun li – pepis sinjorino Elinjo.

- Jes, jes - diris la edzo. - Venu li. Delonge jam ni renkontis neniun. Kiom da tempo pasis depost nia lasta renkontiĝo? Ho, ĉu 10 jaroj, aŭ eble iom pli? Sekvatage Karlo enpoŝtigis sian respondon: venu Gabrielo, ili atentos lin ĉe la trajno.

Alvenis la antaŭlasta tago. Elizabeta kuiris, bakis dum la tuta tago. Karlo menciis: ŝi tiel prepariĝas al la gastoakcepto, kiel oni kutimas antaŭ geedziĝaj festenoj. Elinjo jam tre laciĝis ĉirkaŭ vespero. Ŝi baldaŭ enlitiĝis. Antaŭ ekdormo ili babiladis iom. Karlo rakontis, kiome li admiris Elinjon kaj Gabrielon, kiam ili sidante unu apud la alia legis iun tiutempe aperintan romanon de Gabrielo. Ili sidis sur la arbarrando tuj super la ŝtonminejo, kaj ĝuste sub ilia loko

faŭkis la buŝo de la minejkavo. Ili sidis kaj ofte ridis kune, kiam sekvis iu pli interesa parto de la enlibra historio.

- Vi ambaŭ estis tre obstinaj kaj tamen tre bone komprenis unu la alian - rimarkis pripensade Karlo.

- Nu, tiu kompreno ne estis tute kompleta - respondis Elizabeta.

- Jes, dank' al Dio, ĉar vi restis mia adorata edzino.

- Ankaŭ mi treege amas vin, mia Karlo – certigis lin Elizabeta. Kaj ili ame interbrakumis sin. Poste Karlo enlitigis la foto-albumon, por rigardi, kiel aspektis Gabrielo lastafoje.

Alvenis la sekva tago, la lasta tago, la granda tago, la tago de reveno de ilia malnova, perdita sed reatendata amiko. La unuaj sunradioj salutis humidan matenon. Karlo vekigis malfrumatene.

- Ho, mia karulino estas ankoraŭ laca, ŝi ankoraŭ dormas ankaŭ nun – pensis li. Survestis sian negliĝon, poste mallaŭte, por ne veki Elinjon, la karulino, li eliris en la kuirejon. Sur pleto li prezentis la matenmanĝon al sia edzino, sed ŝi movis sin nek al la agrablaodoro de la freŝe kuirita kafo. Do Karlo demetis la pleton, kaj por veki li kisetis la vangon de sia edzino. Malvarmaj estis ŝiaj vangoj, kolo kaj manoj. Li eksentis teruron, ekploris. Li volis kune matenmanĝi kun sia edzino, sed nun, li ne povis engluti eĉ unu peceton. Li plenvestis sin, kaj kuris al la kuracisto. Kiam li hejmenvenis kun li, antaŭ la pordego lin jam atendis Gabrielo. Mirante ke la geedzoj ne atendas lin ĉe la trajno, li iris rekte al ili. Tie atendis lin nova surprizo: al la sonorigado, frapado sur la pordo nur hundbojado respondis, venis neniu malfermi la dompordon. Li atendis iom, kaj kiam iu najbaro informis lin, ke Karlo antaŭ nelonge forkuris ien, Gabrielo konjektis ion malbonan. Ĉu eble unu el ili malsaniĝis? Li planis iom ankoraŭ atendi, kaj se Karlo baldaŭ ne revenos, li postlasos mallongan mesaĝon, kaj foriros hejmen.

Li ne devis longe atendi, baldaŭ venis Karlo kun la kuracisto. Karlo kaj Gabrielo samtempe ricevis la kuracistan konstaton pri la morto de Elinjo.

Kiam la kuracisto foriris, kaj oni forportis Elizabeton, la du viroj restis solaj. Ili interparoladis pri diversaĵoj, strangaĵoj de la vivo.

- Ĉu vi bonvolus rakonti al mi, kiam vi konsciiĝis, ke vi kaj Elinjo amas unu la alian? – direktis Karlo la demandon al Gabrielo, interrompante refojan silenton.

- Ho, ĉu vi sciis? - demandis nun Gabrielo.

- Jes, mi devis nur rigardi vin kaj ŝin, kaj ĉio evidentiĝis. Nu, kiam tio okazis? - demandis Gabrielon urĝige Karlo.

- Unue mi spertis nur la signojn de la pliiĝanta simpatio. Poste sekvis la donacita fingroringo. Mi sentis, ke pro la gesto mi devas porti ĝin. Ĉu vi vidas? Ankaŭ nun mi havas kaj portos ĝin ĝismorte.

- Sed la konsciiĝo de la plena certeco ekregis min en tiu Kristnasko, kiun foje mi pasigis ĉe vi.

Al vi mi alvenis la dudektrian de decembro, ĉar vi promesis al mi neĝglitadon, vintrajn ĝojojn. Delonge ne havante jam tiujn ĝuojn mi ne povis rifuzi, mi akceptis la inviton.

Kiam mi alvenis, vi hakis lignon, pecigante ĝin al fajrobruligado en fajenca kahelforno, ĉar la pli maldikajn pecojn pli frue kaptas la fajro, ol la dikajn. Kontraŭ via protesto mi helpis vin en tiu laboro. Unue ni dissegis la pli grandajn trunkojn en ŝtipojn.

Poste ni dishakis ilin en maldikajn pecojn. Pro la nekutima laboro al mi fariĝis varmege, sur mia ruĝa kolo reliefiĝis la vejnoj. Elinjo vane invitadis nin enen, ni daŭre plu segis, hakis la lignon. Neatendite ŝi aperis kun du skarpoj. Ŝi donis unu al vi, la alian vindis ĉirkaŭ mian kolon kaŝante unu ĝian finon sub mian ĉemizon de mia malbutonumiginta ĉemizo. Kaj tiam mi eksentis la scivolon en ŝia rigardo: ĝis kie vi estas ruĝa?

Tiu rigardo kaj la fingra tuŝo sur mia haŭto perturbis mian ĝistiaman trankvilon, mi ektemis. Mi ne povis daŭrigi la hakadon. Mia hakilo deglitiĝis el mia mano, kaj pikiĝis ĝia akro ĝuste

apud mia dekstra piedo en la teron. Ni ĝojis, ke mi – pro mia nelerteco – ne detranĉis mian piedfingron. Tiam ni finis la hakadon dirante, ke ni devas lasi laboron ankaŭ por la nova jaro. Post kiam ni duŝis kaj transvestis nin, sekvis la vespermanĝo: granda telero da ŝafkazeaj patkukoj kun multa laktokremo supre, kaj garnaĵo el frititaj lardopecoj, poste kuna sorbado de bona vino. Post la bongustega vespermanĝo ni kartludis, babiladis longe. Noktomezon batis jam la murhorloĝo, kiam ni decidis iri dormi. Tranoktejon mi ricevis en la ĉambro kun lignoskulptita meblaro de la domo. Tri infankapoj ornamis la kapotabulon de mia lito. Rigardante ilin mi ekmemoris miajn filojn kaj tre malgajiĝis. Sed Elinjo ordigis mian liton tiel ame, kvazaŭ karesante: molskuante mian kusenon kaj plumkovrilon, ke forgesinte miajn filojn mi ne povis omaĝi per sufiĉa admiro kaj dankemo pro ŝia ama zorgado pri mi. Ŝia kliniĝadanta korpo estis belega kaj dezirekscita. Ŝia pantalonita korpo figuris koron sub la zono.

- Ho, se ĉi tiu koro povus esti la mia – sopiris mi sekrete en mi, sed poste tuj mi ekhontis pro mia penso. Mi baldaŭ ekdormis kaj dormis kiel iu, kies dormon anĝeloj gardas.

La dudekkvaran, kiam mi vekigis, ĉiuj estis jam plenvestitaj. Vi, Karlo ellitiĝis la plej frue kaj finis la lignohakadon. Baldaŭ poste Elinjo surtabligis la matenmanĝon: sekvinberan ĉokoladan bovlokukon kun varma lakto. Poste ni iris sledi sur la ne prikonstruitan montoflankon, situantan malantaŭ via domo. La ĉielo bluis, la suno brilis, sed la aero akris. Du kontraŭ unu – ni ludis la neĝbulo-maĉon. Tutegalis, kiam kiuj estis pare,- vi kun Elinjo aŭ ni la du viroj, - la rezulto estis ĉiam nedecidita kaj multaj ridegoj. Ho, kia estis ŝia rido! Ŝi havis admirindan sonoratan ridon.

Poste ni viroj ornamis la kristarbon, dume via edzino kuiris. La abio jam brilis, glimis meze de la antaŭĉambro, kiam vi ŝaltis la gramafonon. Vi dancis unuaj. Estis ĝojo, rigardi vin. Vi estis sperta dancista paro. Rigardante vin mi denove eksopiris:

- Ho, se ankaŭ mi povus ĉirkaŭpreni la talion de Elinjo. Ho, se ankaŭ mi povus brakumi ŝin, almenaŭ unufoje en mia vivo! Mia sonĝo ne ĉesis senplenumo. Vi ŝanĝis la diskon kaj demandis min: ĉu mi ne daŭrigus la dancadon kun via edzino, ĉar vi havas nepran taskon aliloke en la domo, kiun vi devas fari ankoraŭ antaŭ la tagmanĝo. Ne sciante, kiu muziko sekvos, ŝi staris antaŭ mi kvazaŭ sekvus tango. Mi direktis ŝin tuŝante ŝian dorsomezon anstataŭ la talio, ke ŝi ne povu foriĝi de mi dum la ĉardaŝaj turniĝadoj. Eksentante la tremon de ŝia korpo, mi sentis tian senliman feliĉon, ke mi eĉ unu vorton ne povis eldiri. Ankaŭ ŝi silentis. Ruĝigante pro varmo ni ambaŭ dancis ĉi sangoekscitan hungaran dancon.

Mi sentis tiam grandan dankemon al vi, ĉar vi donis al mi ĉi sekretan feliĉon. Vi volis, ke ankaŭ ni dancu kune.

- La feliĉon vi ambaŭ elmeritis kaj krome ni ne povas antaŭvidi la estonton - intermetis Karlo – ĉi via dancado estis mia donaco al vi du.

Post ioma silento Gabrielo daŭrigis sian konfeson:

Vi revenis, la ĉardaŝ-muziko finiĝis, kaj ni sidiĝis por tagmanĝi.

Dum via foresto vi fermis la lignajn fenestrotabulojn de la ĉambro kun skulptita meblaro. Ili restis malfermitaj nur tiom, ke tra la aperturoj povu trafiltriĝi la ekstera lumo en malvastaj strioj. La lustro-kandeloj brulis, ŝirmataj per marverda vitra kloŝo. Sur la tablo odoradis la altŝaŭma bonodora vinsupo de Elinjo. Vi, la ceremonio-majstro tute ravis min. Karlo, tiun vian talenton mi ne konis ĝis tiam.

La enfiltriĝanta ekstera lumo efikis, kvazaŭ la betlehema stellumo falus sur nin.

La sekva plado estis la majeste gustanta fandita fromaĝo. Kaj kiam samtempe kun Elinjo mi metis mian forkon kun la frititaj bulkopecetoj en la fonduon, niaj tremantaj manoj intertuŝiĝis por kelkaj sekundoj. Tiam ni du, kaj vi la tria samtempe kliniĝis super la fonduan pladon, por enspiri la majestan fromaĝodoron kaj kaŝi la briladon de niaj pro emocioj larmorosaj okuloj. Ankoraŭ nun mi pensas: ni estis la tri paŝtistoj, kiujn la betlehema stelo gvidis tiam

tien, ke ni povu ekkoni tiun ĉi por ni ne refojigeblan miraklon de la Kristnasko.

Sed, per tio ankaŭ ĉesis la miraklo. Eksonoris mia poŝtelefono. Flegistino de mia bopatrino telefonis, ke abrupte malboniĝis la sanstato de mia bopatrino, ŝi devis enhospitaligi ŝin, do mi iru hejmen, tuj kiam eblas. Samvespere mi hejmenveturis, sed ĉi tiu admirinda Kristnasko estis jam mia. Kaj ĉio estis tiom belega, ke ĉi tiun feliĉon mi volis dividi ĝis nun kun neniuj. Ĉu vi vidas? Ne nur malfeliĉulo silentas, povas muti ankaŭ feliĉulo. Ĝuste pro via stelo mi decidis forlasi nian belan amikan interligon. Doloris, tre doloris, sed mi ne povis forpreni de vi Elinjon. Sed nun, kiam mortis ankaŭ la tria edzino de mia patro, kaj mi restis tute sola, denove tiu stelo gvidis min ĉi tien.

- Jes, la vivo estas ne antaŭkalkulebla - aldonis nun Karlo. Tiam vi forlasis nin, nun Elizabeta. Vi renkontis unu la alian nur por mallonga tera tempo. Sed, al vi Gabrielo, mi povas danki, ke la anima sufero de Elinjo malrapide forpasis, kaj ŝi estis por mi la plej bela donaco de mia vivo.

- Ankaŭ vi estis tio por ŝi – diris Gabrielo konsolante Karlon.- Mi scias pri tio, foje ŝi skribis al mi prie.

- Jes, ni tre amis, komprenis unu la alian kaj ankaŭ vin, Gabrielo. Se vi volas, venu ankaŭ alifoje – vokis Karlo Gabrielon.

Adiaŭante larmo ekbrilis en la okuloj de Gabrielo, ĉar li rememoris la fotoalbumon, kie lian foton rigardis lastfoje Elizabeta.

Baldaŭ alvenis la tago de la entombiga ceremonio. Aro da homoj staris ĉirkaŭ la tombo. Alvenis foraj gekuzoj, estintaj malnovaj gekolegoj, najbaroj, membroj de la kluboj de montogrimpantoj kaj esperantistoj kaj multaj aliaj homoj, kiuj konis, amis ŝin.

La pastro longe parolis pri la bonkoreco de la mortinto. La tombejservistoj komencis porti la florojn sur la tombon. Ĉiuj estis nigre vestitaj, escepte Gabrielon. Li estis vestita en tiu vesto, kiun Elinjo foje laŭdis: li surhavis tiam kaj ankaŭ nun kolombogrizan kompletan kun malhelblua ĉemizo, arĝentgriza silka kravato, grizaj ŝuoj.

La ĥoro jam kantis la lastan psalmon, kiam de ie alflugis buntpluma birdeto kaj haltis sur la tomboŝtono, por ripozi. Ĉiuj okuloj observis la birdeton. La larmoj sekiĝis, la homoj ekridetis en si mem. La birdeto, sufiĉe ripozinte, elpikis petalon el iu blanka rozo de la florkrono, portita de Gabrielo, kaj baldaŭ forflugis.

Ĉiuj miris pri la okazintaĵo. Sed nur al Gabrielo konsciiĝis, ke la birdeto forportis nun la lastan memoraĵon de lia malfrua kaj entombigita amo.



### Milorad Pavić

#### ŜI

Ho, Dio,  
kiel vi ŝin tiel kreis!

Ĉu el stela polvo  
el lunlumo  
el florsemo  
el muziko de virtuoso  
elodoro de printempmateno  
el ĉiellazuro  
el matena ruĝo  
el neĝblanko  
el vespera silento

el susuro de foliaro  
el infana rideto  
aŭ el birdokanto?

Pro kio, do, en mi  
brulas vulkano  
kiam ŝi ne estas proksime?

Sendinto Dimitrije Janicic Beograd  
/V.28.11.2008/

## La „Sankta Triunuo” Hungara Ortodoksa Preĝejo de Miskolc

La miŝkolcan hungaran ortodoksan preĝejon, de antaŭ la turkoj ĉi-tien rifuĝintaj, greklingvon uzantaj komercistoj konstruigis pere de Johano Adami italdevena konstruisto, en malfru-baroka (copfa) stilo. La preĝejon oni komencis konstrui en 1785, kaj jam en 1791 konsekrita estis la ikonostazo, kiu estas – laŭ la ĝenerala opinio – unu el la plej grandaj kaj plej belaj ikonostazoj de Mez-Eŭropo; per sia 16metra alteco kaj la sur ĝin metitaj pli ol 87 bildoj. Baroka-stilo karakterizas la bildojn de la ikonostazo, kies grandparton pentris Antono Kuchelmeister viena pentristo (kiu faris ankaŭ freskojn en 1807), sed pentris bildojn ankaŭ grekaj kaj serbaj majstroj, kies nomon ni ne konas. Nikolao Jankovics (Jankoviĉ), la Eger-urba lignoskulptisto preparis la lignoornamaĵojn de la preĝejinterno. La ikonostazo ligiĝas en organika interrilato al la interna spaco de la preĝejo, kaj kreas per tiu kompletan unuecon. La altaro estas videbla nur dum diservoj, kiam malfermata estas la tn: „reĝa”- pordo: En la plej malsupran vicon oni pentris scenojn de Malnova-Testamento. En la sekva vico videblas Kristo dekstre de la reĝa-pordo, maldekstre la „Dio-naskinto”, apud ili videblas la plejestimataj sanktuloj de la eklezio kaj paroĥo. La sekvaj bildvicoj prezentas la pli gravajn festojn de la eklezio, kiuj pli multe identas pri la gravaj eventoj de vivo de Jesuo. Sur supro de la ikonostazo la sceno de Kalvario aludas pri la suraltare renoviĝanta oferaĵo. En la duonrondon oni pentris bildojn pri la apostoloj, profetoj kaj martiroj. Vidindaĵo de la preĝejo estas ankoraŭ ankaŭ la kultbildo de la „Dio-naskinto”, kion la rusa carino Katarina la dua donacis.

/De la Ortodoksa Muzeo ricevitan hungarlingvan tekston esperantigis: Adri Pásztor/

## D-ro László Kárpáti Hungara Ortodoksa Eklezia Muzeo de Miskolc

Rezulte de kunlaboro de la Hungara Ortodoksa Administrado kaj la miŝkolca „Hermann Otto” Muzeo - post preskaŭ unu jardeka prepariga laboro - malfermiĝis en Miskolc en decembro de 1986 la Hungara Ortodoksa Eklezia Muzeo. El inter la enlandaj ortodoksaj eklezioj la serba havas sciencan kaj artan kolektaĵon kio troveblas en Szentendre /Sentendre/.

La miŝkolca muzeo prezentas liturgan arton kaj kulturan heredaĵon de la hungaraj paroĥoj, fonditaj de grekoj. La kolektaĵo ricevis lokon en konstruaĵo de la iama grandfama miŝkolca greka lernejo / Placo Deák nr. 7./ La ekstere moderece elegantan, malfru-barokstilan konstruaĵon Ferenc Jankovics, riĉa miŝkolca komercisto konstruigis proprakoste en la lasta triono de la 18. jarcento. De la komercista kompanio kaj la paroĥo funkciigita lernejo malfermiĝis en 1805. Dank'al la financa helpo de la departementa konsilantaro, renoviĝis frontoj kaj bonetosaj internaj spacoj de la konstruaĵo.

Nuntempe la Hungara Ortodoksa Eklezio, kun rezidejo en Budapeŝto, havas ses paroĥojn kaj tri filiojn. Ĝia jurisdikcio ekspansias al la hungaraj kaj rusaj paroĥoj, ĝia plej alta instanco estas la Moskva Patriarka Reĝimo. Tutmonde la ortodoksa eklezio havas preskaŭ 200 milionojn kredulojn, el ili tre ege malmulte da kreduloj vivas en nia patrio, kaj ankaŭ el inter ili nur malmultaj estas hungarnaciaj.

La Eklezio gardas ankaŭ kulturen, animan kaj eklezioartan heredaĵojn de la hungaria grekaro, kiu en la 17-18-aj jarcentoj ekloĝis en Hungario. Preĝejoj de sufiĉe multaj – tute aŭ parte – grekaj paroĥoj nuntempe nur en la nomo gardas la memorojn de la originalaj fondintoj.

Ni petas estimplene niajn vizitantojn, ke akceptu la ekspozicion de nia muzeo tia, kiu malpli konatan, sed ofte miskomprenitan parton de la hungara kulturo prezentas kun sincera intenco de tio, ke ĝi faru pli nuanca nian nacian kaj kulturen memkonon.

Sur teritorio de la historia Hungario iam estis 32 grekaj relative memstaraj paroĥoj, kontraŭ la serba eklezia direktado. Dum ilia natura hungariĝo ili plurfoje pruvis ankaŭ kredofidelecon. Nur ĉi tiuj grekaj komunumoj okupis sin pri la zorgo de diseriĝo okazita de hungariĝo.

Pri iliaj sinceraj animaj pretendoj kaj patriotaj sentoj *iliaj liturgiaj librotradukaĵoj* atestadas.

El inter ĉi tiuj la plej gravajn povas vidi la vizitantoj sur la enkonduka unuo. Nome:

1. En la traduko de Stefano Miskolczi detalo el katekismo de Petro Mogila, kiu aperis en 1791, en Peŝto.
  2. Dulingva (greka–hungara) katekismo de Áron Georgievits, aperis en Győr, en 1744.
  3. Theodor Steriady: Evangelioj, epistoloj kaj vivoj de sanktuloj, Vác, 1802.
  4. Preĝolibro de Johano Popovics, iama pastro de Karcag, Nagyvárad/nun Oradea/-1861.
- Same ĉi tie videblas tiuj valoraj permene skribitaj kaj presitaj grekaj libroj, kiuj devenas kune kun ankaŭ aliaj lernezhistoriaj dokumentoj el riĉa biblioteko de la fama miŝkolca greka lernejo.

La aranĝo de la kanona situacio de la grekaj paroĥoj, suferintaj multe da elprovado, povis okazi nur en 1949, kiam ilin akceptis la jurisdikcio de la Moskva Patriarka Reĝimo kaj konsentis pri la uzo de la hungara liturga lingvo.

Severaj kanonaj juroj regulis la esprimilaron, simbolsistemon de la *ikonpentrado*. La pentristoj laboris laŭ instrukcioj de tekstaj aŭ ilustritaj pentrolibro, t.n. *hermeneinoj*, kiuj preskribis ankaŭ la plej etajn detalojn. Manke de tiuj – kiel gvidprincipon – ili sekvis la plej bonan tradicion, akceptitan kaj konfirmitan de la eklezio. En la mezepoko elformiĝis decidita ordo de metado de la preĝejoj ikonoj: el la sanktejdisigilo de la preĝejoj elformiĝis la *ikonostazo*, kiu apartigas la sektejon disde la navo; kaj kiu formiĝis en iomete malsamaj direktoj en la diversaj ortodoksaj eklezioj, konvene – ankaŭ kiel la ikonpentrado – al la naciaj tradicioj. La memstarajn ekleziojn kunigas tuta kredoinstruata unueco, sekve de tio ankaŭ la ikonoj – sendepende de ties lingvo – devas havi la saman unusencan signifon.

Sur teritorio de la historia Hungario ĝis la fino de la 18-a jarcento nur provizoraj ikonpentradaj metiejoj funkciis, la pretendojn kontentigis ĉefe pentristoj invitataj aŭ migrantaj. Ĝis la fino de 18-a jarcento ankaŭ rusaj librovendistoj okupiĝis pri komerco de ikonoj. En la revivigo de la fama mezepoka serba eklezioarto – precipe en la mezo kaj dua parto de la 18-a jarcento – havis signifan rolon la ukraina librografiko kaj la agado de monaĥopentristoj, kiuj vizitis klostrojn kaj preĝejojn de la suda regiono.

Inter la jaroj 1760 kaj 1790, kiam jam okazis la renkonto de la metabizanca tradicio kaj la mezeŭropa baroka arto, kiel interesa fenomeno, agado de malgranda metiejo kvazaŭ returnis la temporadon. Pentrista brigado, konsistanta el kelkaj majstroj kaj ties helpantoj, alvenintaj el Moskopoliso por pentri la murbildojn de la gotika devena preĝejo nomata Dipatrino en Ráckeve, inter 1765 kaj 1771 finis la pentradon de la preĝejo. Ili pentris ankaŭ la al tiu apartenantajn kapelojn Baptanta Sankta Johano, Sankta Kozma kaj Damjan. En 1772 ili

jam laboris en Székesfehérvár kaj en 1774 ili finis la pentradon de la belega murbildaro de la preĝejo. Ĉi tiu malgranda komunumo pentris dum kelkaj jaroj ankaŭ multe da ikonoj, el kiuj nia muzeo gardas kelkajn belajn pecojn.

Ilin karakterizas la neglekto de la reganta baroko, iliaj tabuletoj radias la senkondiĉan insiston pri la tradicioj. Iliaj ikonoj estas severe komponitaj, akre koloraj: ili uzas multfoje la bluan, ruĝan, okran kolorojn kaj sur la drapiraĵoj volonte aplikas or- kaj arĝentornamaĵojn. En la meza ĉambrego estas Sankta Triunuo / Kronado de Maria/-titola ikono, sur kiu ĉi tiuj ecoj estas videblaj. Kun memoraĵoj de agado de la metiejo ni povas renkontiĝi en preskaŭ ĉiuj hungariaj ortodoksaj preĝejoj. Laboron de ilia estro / Theodor Gruntovics /Theodor Sina Krudi / gardas la pretendeme pentritaj ikonoj. Laborojn de Jovan Csetir/Ĉetir/ Grabován, makedovlach pentristo karakterizas transiĝa stilo. Verŝajne li faris la ikonon, pentritan sur tolon, kiu figuras la kronadon de Dipatrino, sur kiu la strukturo de la kompozicio estas ia stiligita ikonostazo. Signitan ikonon de li havas la miŝkolca ortodoksa paroĥo. La jam menciita rusa-ukraina efiko pruviĝis decida sur la majstroj en la dua duono de la 18-a jarcento. La kijeva grotklostro, la pentradmetiejo Lavra radiis fortan efikon.

De fino de 17-a jarcento la vizitantaj rusaj librokomercistoj, la „Konsolantoj de la Ortodoksoj” krom la liturgaj libroj multnombro kunportis tn. etajn ikonojn por privata pieco. Ĉi tiuj pretiĝis ĉefe tn. en pentradvilaĝoj, kie el la loĝantaro multe da homoj okupiĝis pri ikonpentrado kiel hejma etindustrio. El inter la vilaĝoj indas apartan mencion la nomo de Paleh. Plimulton de la ikonoj reprezentas diversaj kopioj de la miraklon farantaj Maria-kultbildo kaj iu karakteriza plurparta tipo. La pli lasta figuras perlinie kaj per malmultaj koloroj miniaturajn festoscenojn kaj t.n. elektitajn sanktulojn. La pli kvalitaj rusaj ikonoj el la 18-a jarcento devenis de rusaj ikonpentristoj de serbaj klostroj de Fruska Gora.

Naŭ Anĝela Ordeno” titola interesa ikono de nia ekspozicio pretiĝis en 1757 por la Besenovo-klostro, mendite de Pavel Nenadovics, ĉefepiskopo de Karlóca.

La grandioza ikono prezentas malnovajn kaj novajn testamentajn temojn: okazintaĵojn de bibliaj tekstoj de la Kreado kaj Apokalipso, pri anĝeloj kaj ĉefanĝeloj. La nekonata pentristo kompletigas la kompozicion per sceno de „kronado de Maria”, akceptante la pretendon de la serba mendanto. Rusa laboro estas la „ne permane pentrita bildo de Jesuo Kristo” tipa ikono, kiu laŭtradicie figuras tiun tukon, kiun Jesuo tuŝis al sia vizaĝo kaj kiun sendis al Abgaros, reganto de Edessa.

Ĉi tiun ikontipon oni nomas greke al „mandylion”, ruse al „obrus.” Signifoj de ambaŭ du estas tuko.

Apud la laŭteme pli konataj ikonoj pri „*Vivo de Sankta Nikolao*” estas videbla la ikono „*Senbrulebla Rozoarbusto*.” La temo baziĝas sur la paraleleco de la eterna virgeco de Maria kaj la malnovtestamenta Mosea relevacio. Ŝatata tipo estas ĝi ĉefe ĉe la rusa ikonpentrado. Ni devas menci iu emfaze la plej belan objekton de nia kolektaĵo, kiu estas ikono *Suferanta Dipatrino*, deveninte el regiono Kreto–Venecio./

*En la meza kaj plej granda ekspozicia tereno* ricevis lokon la oraĵistartaj majstroverkoj de la enlandaj preĝejoj fonditaj de grekoj. La ortodoksa liturgo uzas multe da metalobjektoj, kiuj estas ornamitaj de riĉaj simboloj, kaj el kiuj la muzeo prezentas valoran kolektaĵon. Grandparto de ĉi tiuj memoraĵoj devenas de la riĉaj altaroj. La lokon de la prezento de Eŭkaristia Oferaĵo en ĉiu epoko la donacema intenco, trapenetrita de la devoto, honoris per la plej valoraj artaĵoj. La piecon kaj veran kredon de la pilgrimantoj en la 17–18-aj jarcentoj laŭdas tiuj buksokrucoj, kiujn kiel donacojn, tiuj pilgrimantoj portis al Hungario, kiuj estis sur la Sankta Monto, Sankta Lando, Athos por glori Kriston, lian morton de la krucifikso, kaj lian releviĝon. Rezulte de multjara persista laboro fariĝis – plejofte helpe de iloj faritaj el kudriloj – tiuj belegaj miniaturaj skulptaĵoj, kiujn revenintaj pilgrimantoj plejparte per enlandaj ĉizelistoj kadrigis en arĝento, ke poste tiuj eksterordinare valoraj objektoj ricevu lokon sur la altaroj de la preĝejoj.

Plimulto de *la skulptitaj-arĝentumitaj krucoj* estiĝis en dua duono de la 17-a jarcento. La krucforman lignon kaj vertikale kaj horizontale oni trasegis kaj per la jam menciitaj iloj skulptis la scenojn. Sur la latinkrucformaj kampoj la nekonata monaĥo-skulptisto skulptis

diversajn ekleziajn scenojn./ekz. Krucumado, Baptigo de Kristo en akvo de rivereto Jordan, pli malmulte: Naskiĝo de Kristo./

Unu parto de la aĵurite skulptitaj krucoj pretiĝis en grekaj klostroj de la Meteora. La oraĵistjuvelingoj havas tri grupojn: en la unua estas la karakterizaj balkanaj laboraĵoj, kun multe da filigranoj, koraloj, fajnaj perloj, lakemajloj. Sur la horizontalaj partoj kaj plando estas ŝnuretlektaĵaj ornamoj, ofte islamefikaj stilizitaj floraj ornamoj. En la 19-a jarcento serbaj oraĵistoj laboris laŭ ĉi tiu tradicia gusto. La dua grupo montras eklektikan bildon. La horizontalajn partojn filigranornamoj zonas, sed tiun kaj la plandon jam karakterizas la mez-eŭropa epokstilo. Belaj ekzempleroj de tiu tipo devenas el metiejoj de anoj de la peŝta Pasperger oraĵistdinastio.

La plej du belaj pecoj de la ekspozicio estas la artzorgeme farita *miŝkolca altarkrucifikso*, kiu kaj laŭ ĝia dimensio kaj laŭ ĝia detalriĉeco estas lernejo de la filigrana tipo. La arĝentjuvelingo de *La peŝta krucifikso* estas simila majstraĵo /sur la finoj relikvujoj/, sed kaj la vertikalaj kaj la horizontalaj kaj la plando havas gustojn de diversaj periodoj.

Ĉi-tie estas menciinde iu belega – sed sen skulptita akcesoraĵo – altarkruco, kiu iĝis posedaĵo de miŝkolca Sankta Naum-kapelo, kune kun iu ciborio kaj *episkopa tri parta kandelabro /trikiriono/*, laŭ la surskribo, en 1721. Sur iu flanko de la kruco estas la krucumita Kristo, sur alia flanko videblas tutformo de sian infanon en brako tenanta Diopatrino. Sur la finoj videblas simboloj de la evangeliistoj, respektive anĝeloj. La faranto de ĉi tiu oraĵistverko aplikis la plej diversajn metodojn: mulditaj kaj ĉizitaj detaloj, forte stilizitaj figuroj, varia, orienta ornamentika, ornamente gravuritaj surskriboj donas la pompan ĝeneralan efikon. La ornamoj ripetadas sur la plando kaj hanapkorbo de la menciita ciborio. Inter la mulditaj brakoj de la kandelabro, apartenanta al la kolektaĵo, brilego de plektitaj florkompozicioj el arĝentdratoj, koralbranĉetoj, fajnaj perloj pliigas la efikon. Same devenas el importito tiu arĝentciborio, kiun ornamas portreto de reliefo de „Dekdu Apostoloj kaj Kristo”. Ĝi portas sur ĝia plando venezian urbomarkon, pruvante la intiman kontakton inter la malproksimaj centroj de la greka diasporo. Same la manlaboradon de venecia majstro, Gavriil Ieromonach (monaĥopastro) laŭdas la *Evangelia libro – metala ornamaĵo, kies delikate elformitaj arĝentaj reliefoj, prezentantaj altan fakspertecon, pruvas la fortan efikon de la itala arto sur la guston de la grekaro vivanta en diasporo*.

El nekonata balkana metiejo devenas kelkaj orumitaj arĝentaj bukoj kaj la emajlaornamaj metalaj ornamaĵoj de la evangelio de preĝejo en Gyöngyös.

En la vico de enlandaj oraĵistoj estis la unua Petro Schnell de Nagyszében. Ĝia *hostiujo*, kies supro estas ornamita per malfru-Renesancaj reliefigitaj kaj cizelitaj ornamaĵoj, pretiĝis en 1654. Multe da oraĵistoj de Pest-Buda laboradis por la estigo de kalikoj, diskoj, steloj, lancoj, *komuniigaj kuleroj, garnituroj el litio, incensiloj*, ktp. videblaj en tiu ĉi kolektaĵo. Estas karakterize, ke ankaŭ la ĉiutagaj objektoj / kiel ekz. estingilo por kandelflamo/ portas la pretendemon kaj spegulas ankaŭ la riĉecon de la mendintoj. Ni trovas la majstrosignojn de oraĵistmajstroj: Antono Müller, Jozefo Müller, Francisko Pasperger, Jozefo Schöttl, Georgo Gosmann kaj la miŝkolca Francisko Szombati el inter la plej ofte okupitaj majstroj. Same oni volonte mendis ankaŭ en Vieno kultobjektojn, kia estas ekz. la trarompita arĝenta librogarnaĵo ornamita per lakemajlaj medailonoj, kaj faritaj en 1807. Ĉe la malmultnombraj, malpli riĉaj paroĥoj en la instalaĵoj de la preĝejoj estas oftaj la kandelingo, teleroj kaj pladoj faritaj el stano, kiuj substituas la signife pli multekostajn arĝentobjektojn.

La plimulto de la gravuraĵoj prezentataj en la ekspozicio de la muzeo devenas el la 18-a jarcento. Partoj de tiuj estas gravuritaj – foje miksteknikaj – ikonoj, aliaj partoj de tiuj estas relikvo-tukoj tn. „*antimenzion*”, presitaj per kliŝoj faritaj helpe de la gravuraĵoj. En meze de la 18-a jarcento fama kuprogravuranto estis Hristoforo Ĵefaroviĉ. Nia kolektaĵo gardas ne nur liajn reproduktaĵojn, sed ankaŭ kliŝojn de liaj elstaraj artaĵoj, kiel ĝi gardas la kliŝon

de gravuraĵo, prezentata scenojn de la vivo de Sankta Naum, kaj la kliŝon de grandmezura gravuraĵo, prezentata pejzaĝojn ĉirkaŭ Moskopolis kaj Ohrid.

Unikan, ankaŭ internacie konatan, ekzempleron de nia kolektaĵo Theodor Gruntovics, konata kiel ikonpentristo, gravuris por preĝejo de Moskopolis memore de naskiĝo de Baptanta Sankta Johano. La majstro uzis originalan makedovlach nomformon /Theodor Sina Krudi/ ĉe signado de la folio, kiun li gravuris laŭ la surskribo en septembro de 1767. En la severe plurpartajn, angulajn kaj rondformajn bildokampojn komponitajn figurojn kaj scenojn kompletigas gravajn historiajn informojn portantaj pejzaĝbildoj. Ĉi tiun gravuraĵon oni mendis rezulte de la entuziasmiĝo de Parthenios monaĥo kaj de la malavaro de Andreas Tirka, ano de la fama komercistfamilio. En la rekomenda teksto Vieno estas signite, kiel loko de la farado, sed lokon de la „skizo” la surskribo signas Venecion. Estas konsiderinda la gravuraĵo, kiun financis la peŝta „Greka-Vlach” frateco, kiu figuras la „kvierte mortadon de Maria” kaj kiu verŝajne estis disdonita al la kreduloj okaze de la sanktigo de la preĝejo. Ĝenerale estas direble, ke la facile disvastigeblaj grafikaj folioj signife efikis je aliaj ĝenroj, ĉefe je la ikonpentrado. La ilustraĵoj de la presitaj libroj ofte anstataŭigis la mankajn pentrolibroj kaj donis por la artistoj fidindajn ikonografikajn informojn.

La alia kunaĵo – pretigita per grafika maniero –, menciita en la enkonduka ĉapitro, estas grupo de la *antimenzionoj*, kiuj estas la plej gravaj objektoj de la ortodoksa liturgo. La ortodoksa liturgo ne estas imagebla sen relikvotuko, kiu estas farita plej ofte el pura lintolo, kaj kiu ĉiukaze figuras la entombigon de Kristo.

Inter liturgaj teksaĵoj de la kolektaĵo estas troveblaj ankoraŭ vestaĵoj, ene de tiuj: „*felonion*”-oj (manteloj), „*epimanikion*”-oj (manumoj), „*epitrachion*”-oj (stoloj), zonoj, broditaj kaliko-, kaj diskokovriloj, grandkovriloj kaj iliaj brodadvestaĵoj, kaj broditaj mortotukoj (*epitafios*). El inter pli lastaj estas havaĵo de la miŝkolca preĝejo tiu fama brodaĵo, kiu pretiĝis laŭ ties skribo en 1760 en Vieno pere de financadoj de Georgios Paradinikolaos Turka, Kontandinos Damzo, Andreas Turka kaj Antonios Madzikos, honoraj komercistoj. Ne nur unu paropecoj de ili estas konataj: iun havas la viena greka metropolio /1752/, la alia estas mortotuko de serba preĝejo de Peŝt /1750-52/. En surskribo de la pli lasta estas nomo de Hristofor Ĵefaroviĉ, kaj sur la viena peco nomo de Franz Filler brodistmajstro estas eternigite. Tiel ŝajnas, ke mortotuko de malnova serba preĝejo de Sarajevo / kiun donacis Jovan Miletiĉ, komercisto /kaj la same tie estante kaj de sama persono ricevita, saman temon havanta brodita kurteno estas pecoj de samatemogrupoj. / Al tiu apartenas ankaŭ brodaĵo gardita en Bukareŝto. /La broditaj mortotukoj ikonologie portas karakterojn de kuprogravurada *antimenziono* de Ĵefaroviĉ. Ĉi tiu verko pretiĝis inter 1731 kaj 1737.

/: Tri Sanktaj Hierarkoj, ĉ. 1770. /

La larĝan, veluran, sur ĝia rando zonitan mezkampon ĉirkaŭprenas folia, sarmenta ornamaĵo.

En anguloj de la kuŝanta oblongforma kampo en medalionojn metitaj evangelistaj portretoj estas. Meze estas stilizita bildo de geografiaj ĉirkaŭaĵoj de la torturiĝo: panoramo de Jerusalemo, monto de Golgota, Geĉemana ĝardeno kaj laŭsarkofaga tombo de Jesuo.

En la akso de la kompozicio la malplena krucifikso staras kun du lancoj. Rolantoj de sceno de la en tombon metado vaste kunkliniĝante ĉirkaŭprenas la tolteksaĵe kovritan korpon de Kristo. En la antaŭaĵo de la kompozicio ni povas vidi du anĝelojn per parfumaĵaj ujoj de la sanktoleadon portantaj sinjorinoj.

/Verketon de László Kárpáti, esperantigis László Pásztor/



(1) Evengelia libro-Moskopolis/la dua duono de la 18-a jarcento



(2) Epitafia bildo: Entombigio de Jesuo /Vieno, ĉ. la 1750-a jaro)

/La bildojn kaj la tekstojn ni aperigis permesite de la aŭtoro d-ro László Kárpáti/

### Kuirarto koncerne anseron

Vaga ulo, senzorge marŝanto,  
sur kampo,  
vidis anseron, kiel tiu kontraŭ vento penis.  
Ĉar pafarkon li ĉe ŝultro tenis,  
- al tio sago apartenis, -  
uzi in li povis, sciis,  
pro tio, tion li konsciis,  
ke nun ankaŭ leporon li trafus,  
sed prefere anseron li pafus.  
Ŝajne lin Ĉasist-pasio sieĝis,  
ĉar la pafarkon abrupte li streĉis.  
Birdokropo estis lia celo,  
dum petegis li al alia ĉielo.  
-Mi petas Sinjoro-gracon subitan,  
sur tablon metitan l' anseron stufitan!  
- siajn pensojn li ne bremsis,  
longe poste dezirpensis:  
Sin mem li vidis antaŭ forno rigardantan  
la ne garnatan  
birdon, stufiĝantan, kvietan.  
- Ĉu ĝin vi manĝus rijetan,  
dietan?  
Kutime ĝin oni rostas aŭ fritas  
kaj super ĝi poste tostas kaj spritas.  
Ĝi ne estas pirolo.\*  
Via penso estas frivolo,  
do grave,  
ke ĵetu ĝin brave!  
- diris lia frato kaj pensis li severe,  
ke la anseron en bakujon li metus prefere.  
Malgraŭ tio nia vaga ulo prefere stufus tiun birdon,  
kaj super l' ansero li per valseto emfazus sian virton.  
Laŭ li, por birdo estas pli bona la stagno,  
ol se ĝi pikiĝu per longa rostostango.

Ili jam disputis, ne povis decidi,  
fine ilui iris al saĝul' reciti  
la problemon: stufi aŭ rosti?  
Kiu pravas, rajtos dum festeno tosti.  
Estas multaj klapoj  
en la saĝaj kapoj.  
-Duonon do stufu, la alian rostu,  
l' afero plej grava, ke kune vi tostu!  
Do por sinpravigo okazis lanĉ-iro,  
sed al ambaŭ fratoj plaĉis la konsilo.  
Kiu kun pafarko rolis,

tiu tiel nun parolis:  
Mi denove bone pafos,  
la anseron certe trafos.

Sed en tiu areo en aero,  
kie pli frue estis bird-apero,  
flugis nek ansero, nek pirolo,  
nek rostita, nek stufita.  
Abortiĝis plan' pri voro.

\*Pirolo meritas grandan esptimon. Legu pri ĝi en Vikipedio.  
Elkore salutas vin: Mastro Jano –  
/La 27an de aprilo en 2007, sendinto, la poemon esperantiganto estis Johano Kisspál/

## ŜERCOJ

### La terpomo

Maljuna araba homo loĝas jam pli ol kvardek jarojn proksime de Nov Jorko. Li dezirus planti en sia ĝardeno terpomojn, sed li estas sola, maljuna kaj malforta. Lia filo studas en Parizo. Li skribis al tiu mesaĝon.

Kara mia filo, Ahmed!

Mi estas tre ege malgaja, ĉar mi ne povas planti en mia ĝardeno terpomojn. Mi estas certa, ke vi povus helpi, se fosis grundon de la ĝardeno.

Mi amas vin: Via patro.

Sekvatage la maljunulo ricevas mesaĝon de sia filo.

Kara mia patro!

Ne iru al la ĝardeno. Mi kaŝis tie la „aĵojn”. Ankaŭ mi amas vin: Ahmed.

Sekvatage tagiĝe je la 4-a horo la militarmeo, FBI, CIA, policistoj kaj la oficejo de Sekureco kuratakas la domon de la maljuna araba homo. Ili traesploras la tutan domon, fosas la ĝardenon, sed trovas nenion. Poste matene ili foriras trompiĝante.

Sekvatage la maljunulo denove ricevas retleteron de sia filo.

Kara mia patro!

Mi esperas, ke nun jam la grundo de via ĝardeno estas fosita kaj vi povas planti tien terpomojn. Mi bedaŭras, ke nur ĉi tiel mi povis helpi vin.

Mi amas vin: Ahmed.

/Humuron de d-rino Helena Bikszády, esperantigis László Pásztor/

### Ne sufiĉas esti prava

Malriĉa judo iras al rabeno:

"Mi havas plendon. Kun ŝarĝita ĉaro mi iris sur landvojo. Venis renkonte grafo en sia kvarĉevala kaleŝo.

`Liberigu la vojon, judo!` li kriis jam en malproksimo.

`Deturniĝu Vi, Grafo Moŝto! Vi ja vidas: mia ĉaro estas plena da ŝarĝo.`

Li deturniĝis. Sed kiam li pasis preter mi, li subite klakigis sian vipon sur mian vizaĝon. Ĉu mi pravus, kiam mi petis lin deturniĝi?"

Rabeno: "Vi pravis, sed por judo ne sufiĉas esti prava, li devas esti ankaŭ saĝa."

[El la libro de Tivadar Soros (Teodoro S. Sxvarc) "Maskerado ĉirkaŭ la morto" /Sendinto Teddy Maagan Israelo]

### La fiŝkaptisto

Iu homo fiŝkaptadas kun kruro gips-bandaĝita sur la riverbordo.

Iu promenantulo demandas lin:

- 1 ĉu la fiŝoj mordas?
- 2 Ne, mi nur falis.- respondis la demandita.
- 3

Humoron de Maria Ballán, esperantigis Adri Pásztor

### La kamparano kaj la azeno

Iutage la azeno de kamparano falis en la puton. La besto dum horoj blekis kompatinde, dume la kamparano pensadis: Kion fari? Fine li tiel decidis, ĉar la besto jam estas maljuna, kaj la puton li volis ĉesigi, pro tio ne estas inda por savi la azenon. Li vokis siajn najbarojn por helpi lin. Ili komencis ĵetadi teron en la puton per ŝoveliloj. La azeno perceptis kaŭzon de la faro kaj komencis hurli terurigante. Pli poste ĝi silentiĝis. Post ia tempo la kamparano rigardis en la puton. Li surpriziĝis, ĉar vidis, ke la azeno vivas, kaj la en puton metitan teron mirinde deskuas de si mem kaj staras sur supron de la tero. Kiel la najbaroj ŝovelis la teron en la puton, la azeno deskuis de si mem la teron kaj paŝis ĉiam pli supren. Baldaŭe la azeno saltis el la puton – je ĉies miro -, kaj feliĉe foriris!

*La vivo ŝovelos sur vin ĉiuspecan malpuraĵon, teron. Truko de la el puton grimpadado estas, ke deskuu de vi mem la malpuraĵon kaj faru unu paŝon. Ĉiuj problemoj estas unu pli nova ebleco por paŝi plu. Ekzistas solvo el kia ajn problemo, se vi ne rezignas kaj ne ekhaltas! Skuu vin mem kaj faru unu paŝon pli supren!*

/La humoron senditan de s-rino Helena Böde, esperantigis László Pásztor/

### Letero el Nijhnij Tagil, Rusio

„Karaj miaj geamikoj Adri kaj László Pásztor!

Perĝoje mi legas ĉiam la numerojn de via revuo NORDHUNGARIA INFORMO. Mi jam nun antaŭĝojas al la de vi atendeblaj novaj legeblecoj. Ni tre volonte legos la de vi geedzoj Pásztor alvenantajn verketojn, verkojn.

Bonvolu traduki multe, kaj sendu tiujn al mi. Mi tre volonte legos vian ĉiun tradukaĵon.

Nun mi sendos literaturaĵojn de ni; al vi el nia Esperanto-klubo el Niĵnij Tagil.  
Ni esperas plaĉos niaj verketoj ankaŭ al vi.  
Varme salutas vin kaj viajn Amikrondanojn:

Larisa Kuzmenko el Rusio”

Dum **la multaj** jaroj **de la** agado **de** nia klubo, Lidija Jerofejeva verkis specialajn kantojn por ĝi. **Jen** estas kelkaj:

## HIMNO DE TAGILAJ ESPERANTISTOJ

Vortoj de L.A.Jerofejeva

1. La internacia lingvo  
Iĝis fama sur la Tero.  
Zamenhof dediĉis vivon,  
Fortojn, sciojn al l'afero.  
*Refreno:* Esperanto, Esperanto  
Nia kredo, vojeviganto.  
Unuigas verda stelo  
Nin al vere prava celo.
2. Al homaro lia amo  
Certe estis tre senlima,  
Ĉar precipe li kuracis  
Niajn korojn kaj animojn.
3. Kantu himnojn al Zamenhof  
Kaj batalu por la paco.  
Ni fiere sekvu vojon.  
En ĝi ni ne sentu lacon.
4. Ni steletojn verdajn portas –  
Ĉi signifas amikecon.  
Kredas ni: neniam mortos  
En ni ĝojo kaj frateco.
5. Vivu klubo “Renaskiĝo”,  
Ĝiaj membroj plimultiĝu,  
Zamenhof-spirit’, humoroj  
Vivu en Tagilaj koroj!

## KANTO DE TAGILAJ KOMENCANTOJ

Vortoj de L. A. Jerofejeva  
Zamenhof-heredantoj  
El Tagil komencantoj  
Ni rakontos al vi pri ni tuj,  
Spite al la vetero  
Kaj la hejmaj aferoj  
Ni veturos al Esperantuj’!  
Dum la multaj jaroj de  
la agado de niaklubo Lidija Jerofejeva verkis  
specialajn kantojn por ĝi. Jen estas kelkaj:

## KANTO DE TAGILAJ KOMENCANTOJ

Vortoj de L.A.Jerofejeva

Zamenhof-heredantoj  
El Tagil komencantoj  
Ni rakontos al vi pri ni tuj,  
Spite al la vetero  
Kaj la hejmaj aferoj  
Ni veturos al Esperantuj'!

/Sendinto Larisa Kuzmenko el N.Tagil, Rusio)



## JULIO NOVOTNY LA AVAŜ - MONTA PREĜEJO

### **Kunlaborantoj de la hungarlingva eldonaĵo estis:**

Lektoris: Géza Entz

Jozefo Szabadfalvi

Redaktoro: Julio Novotny

Teknika redaktoro: Georgo Ducsai

La fotojn preparis kaj la kovrilon planis: Ede Valent

ISBN 963 00 0523 9

Eldonas la Avaŝ-monta Calvinana Eklezio

Respondeca eldonisto: Julio Novotny

Prepariĝis ĉe la Borŝod-departementa Presindustria Entrepreno.

Respondeca direktoro: Adalberto Kilián

**Esperantigis:** Ladislao Pásztor – Miskolc, Hungario

**Reviziis:** Attila Makay – Oradea, Rumanio

## MEBLARO DE LA PREĜEJO

### **La reĝa preĝejseĝo**

Poste ni okupiĝos pri monografio pri pereco de la preĝejo, skribita de Szendrei, sed antaŭ tio; ni konsideras la historion de la preĝejo, dezirante rememori pri tiuj meblaraj aĵoj, kiuj ne pereis en la incendio kaj havis gravajn rolojn en la vivo de la preĝejo. Poste ni daŭrigas la historiajn okazintaĵojn.

Post la eksterordinara brula - disfalo, admirind-maniere restis la valora peco de la preĝejo; la admirinde belega pastra seĝo, kiun en 1980-81 restaŭrista sekcio de la Landa Artobjekta Inspektoro renovigis kaj konservis. La pastra seĝo difektiĝis en la preĝejon atingita bombo-atako dum la unua mondmilito. Tiutempe difektiĝis kaj ekfalis kelkaj el ĝiaj valoraj lignaj-inkrustaĵoj (intarzioj), ekz. intarzio de flagon tenanta leono.

Ni nun konigas plej nov-epokan arhistorian skribaĵon de la reĝa preĝejo. Ĝin faris kaj donis al ni Elizabeta Szentgály restaŭristo, de la Landa Artobjekta Inspektoro, kiun ni prezentas helpe de bildoj:

„La plej ranga meblara aĵo estas la renesanca pastra seĝo renovigita nun pretendeme kaj skulptita geometra intarzio el kverkarbo.. Ĉi tiu arte belega, pompa meblo havas unikan historian valoron.

Laŭ la arhistoria esplorkoncepto: la reĝa preĝejo verŝajne staris en kapelo de la fortikaĵo de Diósgyőr. Oni mencias la fortikaĵon kiel reĝina fortikaĵo ekde 1430. La pastra seĝo estas reĝdevena, kiun pruvas ĝia intarzia bildo: „Ĝi videblas sur ĝia pli mallonga fermanta flanko-muro kaj figuras lilian flagon tenantan leonon kuŝanta sur krono.

Dum prospero de la renesanca stilo – ankaŭ la pastra seĝo pretiĝis – posedantoj de fortikaĵo de Diósgyőr estis 1 Beatrice, la edzino de reĝo.

La memoroj de Jagello-epoka, florenca- renesanca, kortego-arto de reĝo Matiaso pereis. La pastra seĝo estas la sola meblopeco, kiu restis el meblaro de niaj mezepokaj reĝaj palacoj. Eĉ: Isamajn objektajn memoraĵojn - de la reĝa kortego radiantanta arto - reprezentas. nur la du pastraj seĝoj de Nyírbátor en nia patrujo.

Celo de la restaŭrado estis la stato-konservado kaj klariga prezentado de la renesanca aĵo. Proksime de la pastra seĝo oni metis la kubutumejon / 1700-aj jaroj / kaj la florornamajn lignotabulojn, kiuj kovras dorson de pli mallongflanko de la pastra seĝo, kiuj estas rangaj memoraĵoj de la popolaj pentritaj lignaĵoj. Ankaŭ ĉi tiujn oni zorgeme restaŭris.

Oni forigis la malĝustajn kaj ne- fakajn kompletigojn de la pastra seĝo, kaj kompletigis ĝian strukturan mankon. Sed oni nenie kompletigis, la mankojn de la intarzio, nur fortigis la loziĝantajn originalajn inkrustaĵojn. Oni signis nur per ĉizo de la inkrustantaj formoj la intarzian ornamon de la novaj strukturaj elementoj

Oni fortigis la seke putritan, de insektoj maĉitan lignomaterialojn helpe de sinteza rezina-impregno.

La surfaco ricevis post kemia purigado konservantan tegajon. La elementojn de la strukturo oni fiksis helpe de ligno kaj novaj kuproŝraŭbo.

La preskaŭ duonmiljara, unuranga memoraĵo de nia mebloarto fine de la rekonstruadaj laboroj, denove rigardeblas en ĝia originala beleco.

La pastran seĝon oni uzis ĝis 1975, kiel Moseo-seĝo./pastra seĝo /Nuntempe ĝi staras sur orienta / malantaŭa / flanko de la preĝejo, en ĝia sanktejo eksteruze nur por prezenado.

### **La nigra /honto/ seĝo kaj ceteraj meblaraj aĵoj**

Laŭ la tradicio, tio estas el 16-jarcento devena, en la suda navo metita „nigra seĝo” /dorsapogila benko/. Nome tiutempe s-ro Ferenc Dóri faris propramane iun novan nigran seĝon kaj metis tien, por eterne memori. Ĝia loko estis signifa okaze de iu pasia juĝista procezo. kontraŭ la predikseĝo, Nome tiu estis loko de seĝo de la procesita Johano Miskolczy./ J. Szendrei, 1890. 242. / Ni parolos pri la nigra seĝo, kiam ni komunikas kelkajn karakterajn disciplinajn kazojn.

El meblaro de la 17-a. jarcento, restis ankoraŭ - el skulptitaj ŝtonoj pretigitaj- cilindra pinto de la predikseĝo, kiun donacis same Ferenc Dóri. Ĉi tiu servis laŭ sia dispono ĝis la 1941-jara renovigo. Nuntempe ĝi estas konservite kaj videbla en ŝtonmuzeo de preĝejo kune kun ceteraj - el antaŭaj jarcentoj devenaj- skulptitaj ŝtonrestaĵoj. Kelkaj monokolektuloj kaj seĝo-surskriboj restis, kiuj estas troveblaj parte en la loka muzeo, aliparte en ekspoziciejo de la turo.

## La preĝejaj sidbenkoj kaj la rajto de ilia uzo -Tablo de la malriĉuloj

Grandan parton de la preĝeja meblaro oni malkonstruis, okaze de la 1941(.)-jara renovigo, ĉar ili estis eksmodaj kaj malkomfortaj. La nova meblaro, kiel ni jam menciis, pretiĝis laŭ planoj de Bálint Szeghalmy.

Sed la balustrad- havantaj sidbenkojn, ornamitaj kun koloraj motivoj; oni remetis sur siajn originalajn lokojn, en la nordan kaj sudan navojn.

Per simplaj rabotitaj lignotabuloj de la forigitaj malnovaj sidbenkoj, oni eternigis memorojn de la multaj disputitaj, travivitaj preĝejaj sidlokoj. El ĉi ties malaperitaj mondoj ni citas kelkajn interesaĵojn.

En la preĝejo, pri la t.n. „seĝolokoj” la urba ĉefjuĝisto kaj la urba konsilantaro decidis. Kaj nur bonegajn meritojn akiritaj homoj kaj iliaj familioj ricevis la t.n. „seĝojuron” kiel signon de estimo. Ĉi tia estis ekz. la seĝo-afero de Stefano Török, juĝisto de la urbo, fine de la 17-a jarcento. Li havis treege multe da elprovadoj, en mallibereco de la turkoj, pro sia ofico en Eger. Post lia morto, en 1724 la konsilantaro, rememorante pri fidinda homo de la urbo, donis lokon en la preĝejo por lia vidvino kaj liaj infanoj, dirante:” ĉar ilia patro, mortinta nobla sinjoro, Stefano Török apud nia urbo, en Eger estis dum malfacila mallibero, en karcero de la paganaj turkoj, pro tio por liaj filinoj kaj lia eksedzino, en preĝejo la signitajn seĝojn dum la preĝejaj aranĝaĵoj uzeblis.” / Urba jarlibro, II.650. /

La preĝejajn sidbenkojn la familianoj heredeblis. Komence de la 1700-aj jaroj oni decidis, ke la plej granda seĝo estu tiel longa,, kiel unu lignotabulo kaj estu taŭga por tri personoj, por ke la bofilino, aŭ edzigita filino povas uzi la seĝon, ĝis kiam la patrino vivas. Kiu alvenas pli frue, tiu sideblas sur la unua loko, sur la seĝo. La sinjorinoj sidis aparte./ de la viroj. J. Szendrei, 1890.397./ Ĉar pri la preĝejaj seĝoj estis multe da disputoj, oni fiksis skribe la rajtojn de la fondintoj, en la preĝejo aranĝita kunveno, 3la 22-an de novembro 1708.,

Komence de la 1700-aj jaroj devenas iu interesa enskribo:

„ S-ino Stefano Rubi havas iun sidlokon apud la al Avas-monto rigardanta pordo, ĉe la ŝtonpiedo, kie estis antaŭe tablo de malriĉuloj. / J. Szendrei.1890.398. / „Ĉu estas tablo de malriĉuloj? Kiu sidis kaj kial apud ĝi? Kiel ĝi aspektis? Ni ne scias. Pri tio ni scias nur, ke ankaŭ ĝi ekzistis !

## La Konsistorio disciplinas

Kvankam granda estis la enhavokapacito de la preĝejo, tamen ne povis certigi por ĉiuj lokojn. Ĉi tiel okazeblis tiu bedaŭrinda kazo, pro tio la Konsistorio disciplinante disponis. Ni citas laŭvorte la protokolan enskribon:

„Por la nobla Konsistorio sufiĉe evidentiĝis tio, ke en la dua tago de Pentekosto en 1758, kiam la kreduloj preparis sin al Sankta Manĝo, tiam s-ino Stefano Jósvai Szabó envenis la Di-servon, vidante en seĝo de familio Dóry s-inon, noblinon Georgo Molnár Borbély, pro kolereto sen iu kaŭzo, per psalma libro tiome frapis ŝian manon, ke la spuro de la frapo - la blua makulo - ankaŭ nun videblas. Pro tio la Konsistorio ĉi jare akceptis tiun rezolucion, ke: en la preĝejo estas malpermesate brui, kvereli, aliajn skandaligi. Se tamen iu kuraĝas fari ĉi tiujn, oni tuj devas senhavigi lin/ŝin de rajto de seĝo, kaj antaŭ membroj de la eklezio devas deklari al vulgara. S-ino Stefano Jósvai Szabó nenion pensante, sur sia seĝo sidanta sinjoro Mikelo Szántay, donis ses forintojn, kiu la sumon redonis al s-ino Stefano Jósvai Szabó, kiu ĉi tiel estis malpermesite de la seĝo.”/Ejkv.1758.I.189./

Uzadoj de la preĝejaj seĝoj, la preĝeja sidordo kaŭzis treege multe da problemoj al la ĉiama urba kaj eklezia estraro. Ĉi tiuj disputoj pri la seĝojuro devenas de la granda diferenco. inter la enhavokapacito de preĝejo kaj la nombro de la kreduloj. Ĉi tiuj seĝoprocesoj tiam forte, malpliigis kiam konstruiĝas, en 1808 la t.n. „Nova preĝejo” kaj la ĉeestantaro de Di-servo

uzas ambaŭ preĝejojn. / Oni jam antaŭe provis solvi tiun problemon, per la tn. „ekstera tombejo”. En la 17-a jarcento multfoje menciita „ligno-preĝejo”, oni aranĝis Di-servojn. dum gravaj festoj Oni decidis manieron kaj tempon de la liturgo./

### **La rolo de „nigra seĝo” - Disciplinado**

Kiel ni jam menciis, ni parolas pri afero de la „nigra seĝo”.

Iu eksterordinara, konsterniĝante pensigita, disciplina kutimo, respektive ilo estis ĉi tiu maniero de la publika pardonpeto de la eklezio. Kiu ofendis per iu peko Dion, ordonon de Dio, eklezion de Dio, aŭ kiu kulpis kontraŭ la bona moralo, kiu estis malĉasta, kiu kalumniasian homfraton; tiu ne povis esti membro de la ĉeestantaro de Di-servo, ĝis ne vestis sin kun pentofara- vestaĵo, la tn. „nigran mantelon” kaj ne sidis en la nigra seĝo. De tie trioblekvaroble ekstarante – depende de la mezuro de sia kulpo – pardonon petis de Dio kaj de ĉeestantaro de Di-servo. Poste tiu regajnis la senpekigon de la pastoro de la ĉeestantaro de Di-servo. Nur poste tiu iĝis denove ano de la ĉeestantaro de Di-servo. Aliel – okaze de malĉasteco – tiun atendis glavego, aŭ pendumilo. La de eklezio pardonon petantaj personoj, staris en la nigra seĝo, kiu estis meze de la preĝejo, kie la pentofaranto estis plej bone videbla de, la ĉeestantaro de Di-servo dum la tempo de tuta Di-servo.

El inter la moral-rilataj punoj, ni komunikas iun interesan kazon:

„La 29-an de septembro 1643 mi, s-ino Stefano Máthé, nask. Suzana Herczeg informas kiujn koncernas, ke mi kulpis antaŭ tio, kiu loĝis kun petolaj fraŭloj, pro mia sataneco mi meritis morton. Sed Samuel Heller, mia edzo-sinjoro entreprenis garantion por mi kaj la honora konsilantaro ĉi tiel disponis: se mi post ĉi tiuj vivus satanan vivon kaj tiu evidentiĝus, tiam min ili mortigeblas. Ankaŭ mi, Stefano Máthé devigas min, konante latronecon de mia edzino kaj tamen kun ŝi loĝante, mi ricevu saman punon, kiel mia edzino. Pri ĉi tiu afero ni ĵuris antaŭ honora juĝisto kaj tuta konsilantaro.” Poste sekvi(iĝ)is la ekapero en la nigra seĝo.

El jurohistoria vidpunkto ni komunikas la sekvan kazon, kiu okazis en 1650:

„Ĉe tribunalo de s-ro Andreo Beke, okazis stato de ĉiuj aferoj de Johano Szücs, kiu delonge kaŝvagadanto, estimatajn homojn maltrankviliganto, satanulo, malĉastulo. Li estis senigita. de sia ĉiu havaĵo, sed poste li havante senkulpigon, unue de la nobla distrikto kaj ankaŭ la honora urbo kaj animinstruisto: Mikelo Kőrösi, dum kelkaj jaroj estante neniu argumento kontraŭ li. Kvankam antaŭe ĉe tribunalo de Seress li estis mortkondamnito, sed fuĝante el la karcero dum kelkaj jaroj kaŝvagadante kun iu latrono Andreo Lakatos; nun jam per mirinda metio li petis kaj ricevis enlason en nian urbon, kaj starante kvaroble en la nigra seĝo en nigra mantelo, en nia urbo ricevis liberan loĝejon kaj en 1647 donis pri si interkonsenton./ J.Szendrei.1890.517./

### **Orgeno de la preĝejo**

En okcidenta parto de la preĝejo, sub la t.n. „stumpa turo” kontraŭ la sanktejo, troveblas la nov-gotikstila orgeno, kiu klopodas konformiĝi al la ĉirkaŭaĵo. La preĝejo havas bonegan akustikon, ĉi tiel kaj la preĝejo kaj la orgeno donas grandiozan eblecon ankaŭ al aranĝo de koncertoj.

La ĥorejo konstruiĝis en 1895 por la orgeno kaj korusoj, konformiĝante al la ĉirkaŭaĵo.

/J.zendrei.1890.34./ La ĥorejon konstruigis Kolomano Kun. Tiutempe oni portis la orgenon el la sanktejo al okcidenta flanko sur ĝian malnovan lokon. Ankoraŭ en jaro de la konstruo pretiĝis la orgeno de la Angster-orgenfabriko de Pécs el „sola donacaĵo” de vidv.s-ino Johano Kaszás, nask. Elizabeta Heer. La du klaviara koncert-orgeno estas en novgotikstila domo kaj havas mekanismon de glit-pec-kesta sistemo. En la unua klaviaro estas 8, en la dua 6 registroj.

Longo de la plej granda fifro havas 5,5 mjn, longo de la plej malgranda fifro 6 mmjn. Estas en ĝi 170 lignofifroj kaj 3010 metalfifroj. En 1971 la orgeno ricevis germandevenan, novan klaviar-tablon de la urba konsilantaro por certigi la kontraŭsidon  
La plej proksima plano de la eklezio estas plua riĉigo de la sonaj varioj.

## AL LA SOCIO DONITA HELPO

### Koncertoj en la preĝejo

De la urba klerigafera sekcio, respektive la urba Arta kaj Propaganda Oficejo – Antono Flach - estis organizite, kaj de la Filharmonio estis aranĝite la unua „Collegium Musicum” – serio okaze de 600.- jara datreveno de la urbo, printempe de 1965. Ĉi tiu programo okazis en ĉiu jaro de printempo ĝis aŭtuno, ĝis la plej nova renovigo de la preĝejo. Dum tiuj aranĝaĵoj multe da famaj artistoj prezentis siajn orgenludojn, kiujn multe da homoj spektis. Ĉi tiuj koncertoj donis neforgeseblajn travivaĵojn. Ĉi tiu serio en 1982 komenciĝis denove. Aranĝantoj de diversaj kongresoj, adiaŭantaj studentoj de la Teknika Universitato kaj diversaj vojaĝagentejoj volonte preferis la bonegan akustikon havantan preĝejon.

### Biblia muzeo

La presbiterio decidis pri iu kuraĝa tasko. en 1955. Ĝi transprenis donacon por la preĝejo: la demonstradan biblian muzeon de la inĝenia Ludoviko Csia, kiel, por ekspozicii ĝin. Tiu enhavis instruan kon-materialon, ĉefe por la junularo. La riĉa materialo estis bone lumigita en multe da vitrintabloj. Oni portis tiun al Miskolc el Di-servo ĉeestantara hejmo de Paŝarét. La Biblia Muzeo estis videbla ĝis 1961. sub la stumpa turo kaj orgenĥorejo. Sed en tiu ĉi jaro oni forportis ĝin al Sárospatak, pro diversaj opinioj pri la loko de la materialo.

## ALKONSTRUAĴOJ

### La enirĉambrego

La Konsistorio kunvenis la 4-an de -?1816 /Ejkv.1816.5./ kaj okupiĝis pri afero de la enirĉambrego. Tie estis decidite la rekonstruo de la malboniĝinta (stano)enirĉambrego de malnova preĝejo de mia eklezio. La realigo de liverado estis malfacila. Ne estis sufiĉaj da ĉaroj, pro tio la Konsistorio tiel supozis, ke la eklezio aĉetu du, aŭ kvar bovojn,...poste (ili iun) taŭgan ĉaron.../ kaj klopodu.dungi pagservistojn. Ejkv.1816.6./ Rapide oni volas pretigi la konstruaĵon.laŭ novgotika stilo. Ili mendis ĉe Katzberger, miŝkolca ŝtonskulptisto, pordokadrojn kaj Gota-formajn fenestrojn. el grizaj ŝtonoj. / Ejkv.1816.15./

Jam estas la 27-a tago de monato de Sankta Jakab en 1817, kiam en la eklezia ĝenerala kunveno /Ejkv.1817.81./, la ĉef-zorganto Jozefo Szathmáry Király, jam okupiĝis pri la lastaj laboroj. Oni preskribas, ke planko de enireja halo estu farite el malmolaj skulptitaj ŝtonoj. Ejkv.1817.81./ Ĉi tiun daton eternigas ankaŭ la seruro de la ĉambrega pordo..

Ne estis harmonio inter la preĝejo kaj ties tegolo-tegmentopro tio okaze de la 1976-1981 jara restaŭrado ankaŭ ĝin oni ŝanĝis al lignoŝindoj. El maldekstra parto de la enirĉambrego iu pli granda pordo kondukas al la ŝtuparo de la ekstriforio kaj iu malpli granda pordo, en iun malvastan ejon. La enirĉambrego havas du gotikajn pordojn sur norda kaj okcidenta flankoj.

En la malnova ŝtuparejo oni metis muran bolton en 1980. Oni renovigis la ŝtuparon, kondukantan al enirĉambrego, ĉi tiel la tuta objekto renoviĝis..

Dum la 1976-jara renovigo, - post la stuko-senigo de norda flankomuro de la preĝejo - aperis spuro de la apud orienta muro de la enirĉambrego. La duetaĝaj gotikaj volbaroj, verŝajne estis etaĝa konstruaĵo. Ĉi tiu estas sendependa de la, en 1939 malkovrita sakristio, kies bazmuron oni altigis lastfoje al 100-150 cm-oj, kaj ties supron kovris per brikoj, por vidigi la eksalkonstruaĵon. Malkovri la sekreton de la duobla volbaro, estos ekscita tasko (de)por la sekvontaj tempoj.

### **La katafalko**

La suplementon kun kalkulraportoj de la ekleziaj protokoloj mi trovis tute hazarde kaj neatendite en budĝetero, numero: 74, en 1762., laŭ kiu: „La malnovan enirĉambregon malkonstruis du taglaboristoj.” /Ejkv.1762.74./

Inter la enskriboj pri kostoj de: traboj, lignotabuloj, lignotabuletoj, ŝindoj, ĉarniroj, tolbendoj, najloj, ktp; ĉarpentist,-kaj masonistlaboroj; oni atestas pri konstruo de la nova enirĉambrega,-katafalko. Tiu jam en la sekva jaro pretiĝis. Ĉi tiel, la ankaŭ nun uzita katafalko, pretiĝis en 1763. Ĉi tiu enskribo refutis multe da pli fruaj supozoj, asertoj. Unuparte evidentiĝis, ke la nuna enirĉambrega-katafalko estis jam pli frue katafalko. Sed pri la pli frua, ni konas nenion. Kiam konstruiĝis la malnova enirĉambrego? Kiam oni malkonstruis ĝin? Ni ne scias. Aliparte ĉi tiu malnova enirĉambrego atestas, ke oni faris la entombigadon dum la 1700-aj jaroj, en la alkonstruaĵo, de la suda enirejo de la preĝejo kiun oni uzis rekte por entombigaj celoj. Ĉi tiu alkonstruaĵo estis restaŭrite en 1981, kies orienta fenestro, ricevis koloran vitron kaj enkonstruitajn komfortajn seĝojn. Ĉi tiel, ties originala „malserena belegeco” povas servi ankaŭ la plej pretendeman guston.

### **PROBLEMOJ DE LA PREĜEJ-APUDE KONSTRUITAJ KAPELOJ**

La afero de enirĉambrega kaj katafalka konstruo estas klara. Sed restas malsolvitaj problemoj la: al preĝejo, aŭ apud preĝejon konstruitaj kapeloj; je estimo, de Sankta Mikelo ĉefanĝelo, kaj je estimo de la ĉieliro de Sankta Maria.. Nome Ludoviko Marjalaki Kiss en lia eseo skribas / Vö.L.Marjalaki Kiss. 1955.13-17./ pri la Sankta Mikelo kapelo, ke tiu: estas en la 15-a. jarcento estiĝita konstruaĵo, kaj restas kiel bazo de la, en 1557 konstruita sonorilturo – pri kiu ni parolos - . Do, ĝi konstruiĝis ne apud la norda flanko de la preĝejo /al tiu konstruita/, sed tute aparte. „ Sed László Keszi Kovács, aludante al tiamaj latinlingvaj ĉartoj /L.K.Kovács.1972.56./ asertas, ke la kapelo estis ne aparta konstruaĵo, sed flanka parto de la preĝejo.

Dum ĉe la norda muro, en 1939, respektive en 1941 farita fosado, oni malkovris la bazojn kaj transiran pordon, - pri kiuj Géza Megay asertis, ke tiuj estas bazmuroj, respektive, la enireja pordo de iu sakristio. Ĉiujn asertojn László K.Kovács refutas kaj deklaras, ke tiuj atestas ne la ekziston de iu sakristio, sed la Sankta Mikelo-kapelo, pri kiu temas ankaŭ la cititaj ĉartoj. Lian opinion fortigas, iu bordero, ankaŭ nun videbla sur la norda muro de la preĝejo, ĉar la ekstera rando de la muro estas pli interne. Ĉi tiu bordero videblas sur la tuta norda muro. Nome apenaŭ estas imagebla, ke la tutan muron okupintus la sakristio. Tiel oni supozas, ke ĝi estis alligiĝa punkto de tegmentostrukturo de la konstruaĵo Do, estas supozebla, ke al norda muro, ne nur la sakristio konstruiĝis, sed ankaŭ la Sankta Mikelo-kapelo. Ties enirejo estebliis kaj el la sakristio, kaj en la norda muro, kie estas nun muro, la rozfenestro. /L.K.Kovács.1972.56./

La alia problemo estas, ke oni devas malkovri lokon de alia kapelo, la Maria kapelo. Nome laŭ la tiamaj ĉartoj „estis altaroj kaj ekzistis kapeloj.” / L.K.Kovács. 1972.56./

Same latinlingva ĉarto pri konstruaĵo, kiun pretigis laŭ la patrona juro, la urba konsilantaro, kompreneble diras...: ”ni permesas, konstrui. kapelon al norda flanko de nia Sankta Stefano paroĉeklezio, je estimo kaj gloro de ĉieliro de Virgulino Maria. /L.K.Kovács.1972.67./ Nome Stefano Kowách el Hejócsaba, komandanto de la reĝa infanteria regimento, kiu helpe de tiu ĉi gajnis /akiris / ankaŭ transdonitan favorsinjoran juron.

El ĉarto evidentiĝas la norda loko de la kapelo, sed restas la demando; kien oni metis la bazon de la kapelo sur la preĝejmuro? Laŭ László K. Kovács, respondo doneblas iu detala malkovro, kiun oni faras en 1895/?/ pri la konstruita enirĉambrego./ L.K.Kovács.1972.56./

Aleksandro Bodó okupiĝas en lia laboraĵo „indikoj al kapeloj de la miŝkolca Avas-monta preĝejo” pri historio de konstruoj de la ambaŭ kapeloj. Li konsideras la konstruadajn eblecojn ĉe suda flanko de la preĝejo. Laŭ li estas ebla, ke la Sankta Mikelo kapelo konstruiĝis sur loko de la nuna katafalko. Sed, la antaŭ 1763 konstruitan, pli fruan katafalkon - kiun interkonsente oni devis malkonstrui – ne apartenas al kapelo, sed al enirĉambrego. Li asertas kun László K.Kovács, ke ambaŭ kapeloj. estis konstruite apud la norda flankomuro. Li aludas al desegnaĵo de Szrogh, poste al tranĉaĵo de Prixner. A.Bodó.1972.77./ Nome ĉi tiuj dokumentoj eblas atesti pri tiu, ke komence de la 19. jarcento. ankoraŭ ekzistis ĉi tiuj kapeloj apud la norda muro. En ceteroj li ne trovis skriban indikon pri sortoj kaj ĉesoj de la kapeloj krom la 1681- jara ĉarto, kiu koncernas al la Virgulino Maria-kapelo. Ĉi tiu en 1681 datita ĉarto . (koncerne de kapelon Maria Virgulino) mencias la kapelon kiel estanta „sakristio”. / J.Szendrei.1904.534 Vö.A.Bodó.1972.77./

- ni daŭrigos -

BAZARO, la adiaŭa

BAZARO estas trimonata Esperantolingva revuo de Asocio de Esperanto CLUJ, Rumanio. Ĝi estas kompleksa revuo pri diversaj temoj inkluzive de Esperanto-movado. Sciinte starigon de la projekto Ĝemelaj Urboj kaj la reta bulteno “Informilo de Ĝemelaj Urboj” la asocio sendis al komisiito ekzempleron de ĉiu numero ekde 2003. En la revuo ofte aperas artikoloj aŭ informoj pri ĝemelaj urboj. Nia bulteno porekzemple citis informon “Invito al Ĝemelurba Renkontiĝo por 2005 Internacia Simpozio”, raporton “Germanaj esperantistoj vizitis la urbon Gherla” ktp. sed BAZARO adiaŭos nin per la 50-a numero pro konsidero de s-ino SIGMOND Júlia, la redaktoro, al sia altaĝo: 80 jaroj! Mi povas kompreni ŝian decidon, kaj admiras ŝiajn energian laboron kaj senlacaĵon penadon por la Esperanto-afero. Mi kredas, ke en estonteco iu agemulo transprenos la stafetbastonon de BAZARO kaj reaperigos ĉi-bultenon antaŭ ni.---la redaktoro

El Informilo de Ĝemelaj Urboj  
Reta bulteno de UEA pri la projekto Ĝemelaj Urboj  
8-a jaro N-ro 2 (29) Julio 2009  
UK!  
Bjalistoko!

Pri la ĉarma kongresa urbo Bjalistoko vi povas legi ĉe  
<http://eo.wikipedia.org/wiki/Bjalistoko>.

UK

**\*En Bjalistoko 25.07-01.08.2009\***

\* \*

El la kongresaj bultenoj unua kaj dua, la estontaj kongresanoj povis legi pri la kongresa urbo, programoj kaj aliaj sciindaĵoj. Legante tiujn oni povis pensi, ke ne por ĉiuj estos facile alproksimigebla la kongresa urbo. Ni eksciis, ke multoj vojaĝis tien ŝanĝante diversajn veturilojn, kaj tiuj vojaĝoj fariĝis oferoj je glorigo de la granda celo. Ni, la geedzoj Pásztor same pensis, ke la trifoja ŝanĝo de niaj trajnoj, sufiĉe granda ofero estos tiucele. Sed, dume evidentiĝis ties malo.

Kiam la 23an de julio 2009a ni ekvojaĝis al nia fincelo, ni ne pensis, ke tiu vojaĝo ne estos facila, laŭkutime. Jam je la vojaĝkomenco la fervojistoj atentigis nin, ke la trajno progresos antaŭen pli malrapide ol kutime, pro la 37C grada varmego, ĉar pro la varmego la reloj eble malrektiĝos, do devas eviti la eblan akcidenton. Nia vojaĝo inter Miŝkolc kaj Budapeŝt jam je 45 minutoj iĝis pli longdaŭra ol la normala 2 kaj duonhora. El nia ĉefurbo ni ekvojaĝis per nova 15 minuta malfruo. Poste, pro la varmego ankaŭ nia ĉi trajno vojaĝis multe pli malrapide ol kutime. Pro la varmego nokte fulmotondro trabalais la aeron kaj grandterenan grundon de Slovakio kaj Pollando. Pro la ŝtormega vento (en kio kelkuloj mortis en Pollando) la arboj kliniĝis ĝistere. Mi vidis tiun bone el la vagonfenestro. Pro la noktomeza ŝtormo ni ekhaltis. Poste pro tio nia trajno haltis plu kaj restis longe samloke, ĉar la supraj elektraj kondukiloj disŝiriĝis pro la ventego. La riparistoj ne venis reparaĵojn ilin ĝis la matena naŭa horo. Vi devas scii, ke la kablano difektiĝon okazigis la ventego, kiu detruis grandan parton de la relvoĵapuda pr. 5 km longe kuŝanta pinarbaro. La pin-trunkoj ne kliniĝis en la ventego. Ili rompiĝis kaj falis surteren. Dum la restarigo de bonstato de la relparoj, oni devis dissegi la grandajn trunkojn, meti ilin sur ŝarĝvagonojn (entute pleniĝis per ili ses vagonegoj), kaj post la tiela purigo de la relvoĵo devis komenci la riparon de la kabloj. La tuta laboro kauzis 19 horojn da malfruiĝo. Tiam ni malfruis jam 24 horojn. Ĉi afero rezultis, ke nia trajno defalis el la ordinara fervoja trafiko. La slovakaj kaj ĉeĥaj fervojistoj nur tiel solvis la problemon, ke ili tirigis nian trajnon sur flankajn mort-relparojn por atendi, ke nia trajno atendu la alian hungaran trajnon el Hungario ekvojaĝintan: 24 horojn post ni. Tiel la du kunligitaj trajnoj aspektis kiel longa serpento. Post 50 hora vojaĝo ni sukcesis enkuri la stacidomon Warsawa Centralna, kie jam ne atendis nin la pola samideanino: Alina Mozer, kiu vane volis renkonti kaj ekkoni nin, kaj post dek hora atendo ŝi iris hejmen por ripozi. (Dum nia kongresa ekskurso ni sukcesis renkontiĝi kaj interamikiĝi). Do, el Varsovio post denova atendo kaj 2 kaj duonhora vojaĝo ni sukcesis alveni en Bjalistokon. Tie ni estis tre kore akceptitaj kaj ni provis forgesi nian lacecon kaj la malgajon pro la perdita grava tempo. El inter tiuj lokaj allogaj programoj malfacile eblis elekti, ĉar multaj estis anoncitaj al la sama tempo. Do ni elektis, kaj poste malgajis pro la preterlasitaj aliaj eblecoj. El la partoprenitaj programoj mi mencias la solenan inaŭguron de la kongreso, la prelegojn de la kongresa universitato, la artajn prezentojn, koncertojn, filmoprezentadojn, la urbajn programojn, nian ekskurson kaj la solenan fermon de la kongreso. La renkontiĝo kaj interparolado kun s-ro Ludoviko Zaleski - Zamenhof dum transdono al li de nia jubilea kongresa donaco (unu botelo da hungara vino el nia Vinregiono Tokaj), lian emociiĝintan surprizitan rideton vidi, jam meritis nian tutan vojaĝlacecon! Niaj pliaj karaj travivitaj eventoj kronas niajn kongresajn agrablajn rememorojn. Ĉiu devas scii, ke dum la aranĝo en intereso de Esperanto kaj ĝia kongreso finita multega laboro, fortostreĉo de la organizantoj, helpantoj: estis giganta, kaj ege altvalora, sekvanta ekzemplo por la neesperantista loka, regiona kaj landa loĝantaro: por montri kiun povas plenumi ĉi lingvanoj, kiu lingvo kunligas ties parolantojn, la adeptantojn de ideoj de la tie naskiĝinta d-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof. Bedaŭrinde okazis nedeziritaj agoj. Pri tiuj la Kongresa Kuriero faris mension, kaj oni povis plie legi en la Libera folio:

<http://www.liberafolio.org>,

## "VANDALO ATAKIS MONUMENTON DE ZAMENHOF

Vendred-vespere vandaloj atakis la monumenton de Zamenhof en la centro de Bjalistoko, kie estis okazinta la Universala Kongreso de Esperanto. La antaŭan nokton iu ĵetis botelon kun bruliga likvaĵo en la direkton de la Bjalistoka Esperanto-Centro... rakontas la loka gazeto.

La incidento ĉe la busto de Zamenhof, okazis ĵaŭde vespere post la 19-a horo. Laŭ iu atestanto, junulo eble 18-jara, en kapuĉo, prenis el sia sako ion, verŝis farbon sur la vizaĝon de Zamenhof, kaj rapide forkuris. Neniu ĉeestanto havis tempon interveni.

### La loka gazeto Kurier Poranny

(<http://www.poranny.pl/apps/pbcs.dll/article?AID=/20090731/BIALYSTOK/8798577>)

61 ) Oni supozas, ke temis pri rasisma atako, kredeble pro la juda deveno de d-ro Ludoviko Zamenhof. La repaĝo de la gazeto rakontas, ke jam antaŭ la kongreso estis bruligita la "tendo Zamenhof" ĉe la kongresejo, kaj ke nekonatuloj tranĉis la pneŭmatikon de iu aŭtobuso de esperantistoj. La gazeto rakontas ankaŭ pri la atako kontraŭ la amasloĝejo de junaj kongresanoj. La evento okazis nokte inter lundo kaj mardo.

Aldone la sama gazeto rakontas, ke en la nokto inter merkredo kaj ĵaŭdo nekonata atakanto ĵetis botelon kun bruliga likvaĵo kontraŭ la nova Zamenhof-Centro. La ŝtona domo ne ekbrulis, kaj la okazintaĵo estis malkovrita de gardisto nur ĵaŭde matene.

Plej amara estas tio, ke pri ĉi tiuj faroj kulpis eble urbano de Bjalistoko. Ho, la bjalistokanoj tiel devis salutakcepti la esperantistojn... La vicurbestro Aleksander Sosna, kiu alvenis al la busto de Zamenhof baldaŭ post la atako, ekhavis amarajn sentojn pro ĉi okazintaĵoj. Feliĉe 3 horojn post la okazintaĵoj ties spurojn oni forigis kaj nenio restis el ili krom la rememoroj.

Sinjoro Robert Kamiński rakontis al mia pridemandado, ke ili juĝis la eventojn huliganaj agoj, kiuj bedaŭrinde tute ĉiutagaj estas ankaŭ en aliaj polaj urboj. Tiuj homoj ofte faras stultaĵojn nekompreneblaj ankaŭ la nuntempajn ekonomiajn, kulturajn, moralajn agadojn de ilia patrolando kaj de la mondo.

Plejloke ili rompas skulptaĵojn, bruligas aŭtomobilojn kaj agas kontraŭ la fremduloj. Antaŭ la nunaj incidentoj ili atakis kontraŭ la landon vizitantaj negruloj. Povas esti, ke la huliganojn estris ankaŭ nun la sama penso, atakante la kongresajn ekskurs-aŭtobusojn kaj la junularan amasloĝejon. Ili penseblis se la aŭtoro de esperanto estis jud-devena, eble nur judoj povis veni amase tien por kongresi....La polico serĉas la kulpulojn....”

•••

Por ni la stultaj agoj estas ĉiam neakcepteblaj, ĉar la perfortaj agoj solvas neniun problemon, ne montras antaŭen - el kio ajn kaŭzo estas ili faritaj! Nun ankaŭ nin profunde atingis ĉi okazintaĵoj. Sed tiu fakto, ke la organizantoj ne lasis ĝeni la Esperanto Mondkongreson dum sia vivo kaj laboro, tamen kontentigas nin. Pripensu, ke partoprenis tie tiu tre aĝa, simpatia kara homo Luis Zaleski- Zamenhof mem, la nepo de d-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof! Lin savi devis de ĉiu malagrabraĵo, ke li povu hejmenporti siajn vivigajn karajn rememorojn pri la estimdono al lia avo kaj same al li!

Huliganoj vivas ĉie en la tuta mondo. Mi spertis, ke ne ekzistas universala kono de la ĉion scio. Bedaŭrinde tiuj malsaĝaj agoj montras ilian mankhavon de mondaj trezoroj de la

historiaj, kulturaj, moralaj sciindaĵoj. Tamen, mi ne miras jam pri la okazintaĵoj, nur tre-tre bedaŭras, ke tiuj tamen okazis kaj ĝuste dum la bjalistoka festa jubilea Universala Kongreso de Esperanto.

**Ni certas, la puno ne forrestos!**

**Malantaŭ ni havante jam ĉi korbatajn agojn, ni devas kunlaborante konvinki la homojn, ke apud ilia patrolingvo ili havu la Esperanton por pli bone kompreni unu la alian en intereso de la paca vivo de la homaro.**

/Fontoj. Boris Kolker pri la bjalistoka loka gazeto, <http://www.liberafolio.org>, kaj s-ro Robert Kamiński/

Sinjorino Adri Pásztor

## KONGRESA REZULUCIO

La 94-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Bjalistoko de 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 2009, kun partopreno de preskaŭ 2000 homoj el 63 landoj en la jaro de la 150-a datreveno de la naskiĝo de la kreinto de Esperanto, Lazar Ludwik Zamenhof, kaj samtempe en la Internacia Jaro de Akordiĝo proklamita de Unuiĝintaj Nacioj, diskutinte la kongresan temon "Krei pacan ponton inter la popoloj: Zamenhof hodiaŭ", kaj studinte kun aparta atento la vivon kaj verkojn de Zamenhof, notinte la fakton, ke la urbo kaj regiono de Bjalistoko pli kaj pli rekonas la escepte gravan rolon, kiun Zamenhof ludis kaj daŭre ludas kiel monde rekonata figuro en la morala evoluo de la homaro,

konsciante, ke tiu rekono konkretiĝis interalie en la malfermo de Centro Zamenhof fare de la urbaj aŭtoritatoj de Bjalistoko, kaj en propono, ke la Bjalistoka Universitato ricevu la nomon Zamenhof;

memorigante, ke okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de Lazar Ludwik Zamenhof Unesko rekonis lin kiel unu el la grandaj personecoj de la mondo, kaj ke tra la jaroj venis multaj similaj rekonaj pri la meritoj de Zamenhof kiel granda monda pensulo, kaj gratulante Unuiĝintajn Naciojn pro ĝiaj iniciatoj rilate al la ideo de akordiĝo, tiel esenca en mondo kiun dividas malakordoj pro antaŭjuĝoj kaj manko de toleremo, konstatas, ke

1. Per la internacia lingvo Esperanto, Zamenhof kreis unike efikan ilon de internacia komunikado sur neŭtrala bazo, sen favori unu popolon super alia, kaj sen favori unu etnan lingvon super alia, kaj ke tra pli ol 120 jaroj da uzado Esperanto pruvis sian taŭgecon kiel internacia lingvo plene adaptebla kaj adaptita al ĉiuj komunikaj bezonoj.
2. Tamen, Zamenhof samtempe komprenis, ke lingvo estas kolektiva posedaĵo, kaj konfidis la evoluon de sia lingvo al ties komunumo de uzantoj, tiel ke Esperanto kaj ĝia kulturo fariĝis esence kreaĵo kolektiva, kiu evoluis en spirito de lingva demokrateco.
3. Tion farante, Zamenhof ankaŭ rekonis, ke utiligo de neŭtrala lingvo en la internaciaj rilatoj helpus konservi lokajn kaj regionajn lingvojn kaj kulturojn kaj la identecon de ties komunumoj.
4. Zamenhof ankaŭ signife kontribuis, per siaj verkoj kaj agoj, al klopodoj forigi la malamikecon inter la anoj de la diversaj religioj, al forigo de rasaj antaŭjuĝoj, kaj al rifuzo de milito kiel akceptebla maniero solvi disputojn – valoroj same gravaj en la nuna epoko kiel en la epoko de Zamenhof.
5. Sekve, Zamenhof plene meritas pli da atento ne nur kiel kreinto de lingvo sed kiel persono, kiu strebis al aŭtenta frateco inter la homoj surbaze de plena kaj reciproka kompreniĝo.

6. Tia frateco povas veni nur kiam la homoj interkompreniĝas en recipoka respekto - procedo, en kiu Esperanto povas ludi kaj jam ludas unikan rolon.
7. Interkompreniĝo estas esenca paŝo al tiu profunda kaj daŭra akordiĝo, kiu estas la celata idealo de la Internacia Jaro de Akordiĝo.
8. Akordiĝo eblas nur en situacio, en kiu lingvaj diferencoj ne formas baron al egaleca dialogo.
9. En tiu senco Esperanto estas unike taŭga kiel bazo por daŭra akordiĝo, kaj Universala Esperanto-Asocio, per sia atento ankaŭ al moralaj valoroj kaj al respekto de homaj rajtoj, povas signife roli en plenumo de la celoj de la Internacia Jaro de Akordiĝo.

/Bonhumora Zamenhofano 8 – Kongresa Kuriero, sabato, 1a de aŭgusto 2009a/

•••

Mian ĉi raporton finante mi deklaras, ke la 94a UK estis bonege aranĝita, por festi tie Zamenhofon. Ni rememoras la gigantan laboron plenumitan en ĝia intereso! Tiu brile glorkronis la zamenhofajn ideojn kaj ties frukton la lingvon Esperanton, kiu kunligas la adaptojn de la homaranismo. Ni, la redaktantoj de ĉi interkomunikilo tre bedaŭras la tiun profunde belsonan festadon malhelpi volantajn agojn en tiu urbo, kies loĝantoj kaj gvidantoj tiel multe faris protekti nian 94an Universalan Kongreson. Sed ĝuste ĉi ago montras la necesajn sekvajn paŝojn, kies unuoj devas esti la konvinkoj de la neinteresantuloj kaj de la sinkaŝantaj kulpuloj, por ebla forigo de la ankoraŭ nun flagranta malamo kontraŭ la fremduloj kaj la nur por tiuj homoj fremdaj ideoj.

**Multdankoj al la organizantoj, ke ni povis kune festi kaj tiu estis senĝena! Laboru plu!  
Multan sukceson, nerompeblan entuziasmon kaj bonan sanon ni deziras al tiu laboro!**

•••

s-rino Adri Pásztor.



**Miskolc**



## NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Arany János u. 35. 4/2.

*Tel.: + 36 70 206 1739*

*Tel.: + 36 70 570 8895*

*Tel.: +36 46 738 982*

Retpošto: [pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu](mailto:pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu)

Retpaço: <http://kiralylajos.extra.hu>